

1974 januaro

67-a jaro

n-ro 817 (1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Signifo de la tokia tosto

Vi trovos

ĉi tiun numeron teknike sufiĉe novaspekta kaj espereble pli plaĉa, kion la redakcio ja celis atingi per la enkondukitaj ŝanĝoj. Pligrandiĝis la litertipo, sed la rezigno pri larĝa margeno ebligis, ke la amplekso de la enhavo restu la sama kiel antaŭe. Ni faris klopodojn harmoniigi la rubrik-titolojn kaj ĝenerale celis modernigi kaj plibeligi la aspekton. Unu el la rezultoj certe estas pli bona legebleco, kion salutos multaj niaj legantoj.

Ankaŭ la enhavo de la unua numero en ĉi tiu jaro celis esti nova kaj interesa, precipe per pli ampleksa traktado de kelkaj aparte gravaj temoj. Antaŭ ĉio, la nunaj pozicioj de la Internacia Lingvo en Ĉinujo okupas plenajn kvar paĝojn, dum komento pri la araba lingvo-politiko troveblas sur la paĝoj 3 - 4. Novjara mesaĝo de la Prezidanto okupas la najbaran paĝon. Ne forgesu priatenti plurajn novaĵojn rilate al la ĉi-jaraj UK kaj IJK.

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo: Unueco super ĉio (I. Lapenna)
- 2 Teknika estrarkunsido
- 3 Aplaudado por la araba lingvo-politiko (S. Milojević)
- 5 Pliaj labor-lingvoj en UN: La vitra Babel-turo
- 6 La nuna pozicio de la Internacia Lingvo en Ĉinujo: Esence diferenca de la cetera mondo (Kurusu kei)
- 10 PIF: Preskaŭ ignorata de la vasta publiko (R. Imbert)
- 10 Dulingva instruado deviga
- 12 Recenzoj ("Esperantonimoj", "Salome", "La naciaj malplimultoj en VDR", "Skota legendaro"), Laste aperis
- 14 Enciklopedio: La aliteracio (K. Kalocsay)
Leterkesto (W. De Smet, Ch. Knabe)
- 15 Novaĵoj pri la 59-a Universala Kongreso en Hamburgo
- 16 TEJO-paĝo: La 30-a Internacia Junulara Konferenco
- 17 Loke — fake — persone (mallongaj novaĵoj)
- 18 Oficiala informilo, Unuguldenaj ŝparlibroj (E. J. Woessink)
- 19 Esperanto en radio
- 20 Anoncetoj

La kovrilo

La "tokia tosto", kiun ni aludas sur la kovrilo, rilatas al la bonveniga bankedo, kiun Japania Esperanto-Instituto aranĝis en Tokio la 18-an de aŭgusto 1973, por la delegacio de Ĉina Esperanto-Ligo, ĉeestinta la 60-an Jubilean kongreson de japanaj esperantistoj. Sur nia foto estas s-ro Je lajŝi (maldekstre), vicprezidanto de ĈEL, ĉefo de la delegacio, kaj prof. d-ro Egami, prezidanto de JEI kaj komitatano de UEA. La signifon de la "tokia tosto" amplekse analizas japana esperantista pioniro Kurisu kei sur la paĝoj 6 — 9.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)
Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Estrararo de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, FR Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, FR Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

Unueco super ĉio

POST LA KUNFANDIĜO en 1947, UEA ekmarŝis sub la trafa devizo "Unueco estas forto", sed devizo, eĉ la plej sencohava kiel tiu ĉi, per si mem ne sufiĉas. Por fakte kunigi la fortojn kaj efike direkti ilin maksimume unuece al plenumado de difinitaj taskoj kaj atingo de konkretaj celoj, necesis kaj nun plu necesas multe da pacienca konvinkado, ligita al paralelaj praktikaj aktivadoj. Pri tio konsciis ĉiuj klarvidaj membroj kaj funkciuloj de la unuiginta UEA ekde la momento de la kunfandiĝo. Efektive, necesis krei unuecon en diverseco.

La diversecoj kaj malsamecoj en la Esperanto-Movado estas el multaj vidpunktoj preskaŭ tiel senfinaj, kiel la varieco en la mondo, kies parto ĝi estas. La praktikanĵoj de la Internacia Lingvo apartenas al diversaj rasoj, nacioj kaj malpli grandaj etnaj grupoj kun propraj kulturoj kaj civilizacioj. La apartaj moroj kaj kutimoj, konsistaj partoj de unuopaj civilizacioj rezulte de longaj tradicioj, ofte kaŭzas ne nur malsamajn, sed kelkfoje eĉ kontraŭajn etikajn kaj estetikajn konceptojn. En la Esperanto-Movado estas reprezentitaj en pli aŭ malpli alta grado ĉiuj klasoj, sociaj tavoloj, profesioj kaj okupoj kun propraj specialaj interesoj. El vidpunkto de edukiteco la diferencoj ne estas malpli grandaj. En la Esperanta lingva kolektivo la gamo etendiĝas de elementlerneja edukiteco ĝis akademia klereco.

Tia estas la realaĵo kaj tia varieco estas per si mem pozitiva. Sed restas la fakto, ke la skizitaj grandaj diferencoj prezentiĝas kiel obstaklo nepre venkenda, se temas pri organizita agado postulanta maksimuman unuecon por plua disvastigo de la lingvo.

Du faktoroj de unueco

Vid-al-vide de tiuj malsamecoj troviĝas du faktoroj de unueco. Malgraŭ la multflanka diverseco, malgraŭ ĉiuj diferencoj kaj naciaj kaj sociaj kaj ideologiaj, la Esperanto-kolektivon kunligas ne nur la lingvo kiel tia, sed samtempe, eĉ pli signife, ĝia objekte internacia karaktero kaj la fekunda funkcio, kiun ĝi estas vokita plenumi en la fluado direktita al universaleco. Ĝuste tiu funkcio eksplikas, kial Esperanto altiris unuavice internaciismajn elementojn, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj transpasas la limojn de ilia nacia, etna aŭ lingva teritorio. Kaj tiaj elementoj troveblas en daŭre kreskanta nombro, malgraŭ la nuntempa ondo de naciismo, en ĉiuj sociaj tavoloj, sur malsamaj niveloj de edukiteco, en diversaj religioj kaj politikaj partioj aŭ aliaj sociaj kungrupiĝoj. Humanisma internaciismo ne

estas monopolo de kiu ajn aparta socia grupo, sed estas ĝenerala socia fenomeno, disvastiĝanta en multnombraj sociaj medioj de progresemaj fortoj.

Centrifugaj tendencoj

Tamen, pro la socia konsisto de la Esperanto-Movado, neeviteble ankaŭ en UEA esprimiĝas ekstremismaj starpunktoj kun fortaj centrifugaj tendencoj. Du specoj estas klare distingendaj:

Kelkfoje temas pri konscia misuzo de diferencoj kun la celo inciti malkonkordon kaj kaŭzi disrompon por kontentigi siajn proprajn troajn ambiciojn, aŭ pro diversaj aliaj personaj motivoj kaj privataj interesoj. Tiaj negativaj fenomenoj, kiom ajn bedaŭrindaj, estas almenaŭ kompreneblaj, ĉar, tutsimple, la universaleco de la lingvo inkluzivas la eblecon utiligi ĝin por kiu ajn celo.

Tute alian specon de problemoj kaŭzas ne la misuzo, sed la nekono aŭ nekompreneco de malsamecoj, kun la akompana foresto de mondaĵaj perspektivoj kaj rilate la signifon de la lingvo kaj koncerne la rolon de UEA. Rezulte, unuopuloj aŭ apartaj grupoj inklinaĵas sincere rigardi siajn proprajn ideojn kaj konceptojn, ofte objektivaj ekstremajn, kiel ĝenerale validajn. Sekve, ili klopodas altrudi siajn ekskluzivajn vidpunktojn al la tuta Asocio kiel tia, ne komprenante, ke per tio ili fremdigas ĉiujn aliajn sekciojn de UEA kaj tial malfortikigas ĝian unuecon, necesan por la realigado de ĝiaj celoj kaj utilan por ĉiuj, inkluzive eĉ la politike ekstremajn aŭ alimaniere ekskluzivajn grupojn. La samo koncernas religiajn aŭ similajn konceptojn, aŭ ideojn bazitajn nur sur specifaj regionaj konceptoj, se ilin oni altrudas kiel ĝeneralajn kaj tial, fakte, kiel ekskluzivajn el vidpunkto de aliaj. Ĝuste tial necesas kaj denove necesos atenti, ke en la centraj organoj de UEA estu maksimu-

SUR LA SOJLO DE 1974

En la nomo de la Estraro de UEA, de la Centra Oficejo kaj en mia propra nomo mi deziras al la aliĝintaj organizaĵoj, komitatanoj kaj observantoj, ĉefdelegitoj, perantoj kaj delegitoj sukcesplenan laboron kun multaj pozitivaj rezultoj! Al la tuta membraro feliĉan kaj prosperan Novan Jaron!

Prof. d-ro Ivo Lapenna, prezidanto

me reprezentitaj la grandaj kulturoj kaj civilizacioj de la mondo, por ke estu daŭre korektataj la eblaj unuflankaj vidpunktoj, fremdaj por la aliaj kaj malutilaj por la tuto.

Urĝas kompreni, ke ne la malsameco de politikaj kaj aliaj ideoj obstaklas unuecon, sed la unuflanka altrudado de siaj propraj tiaspecaj konceptoj kiel ekskluzive validaj por la tuta UEA

Al la kategorio de centrifugaj tendencoj apartenas ankaŭ la troigitaj emfazoj de apartaj agadsferoj kun samtempa neglektado de ĉiuj aliaj. Se la personoj kun intereso centrigita al unusola aktivado, aŭ al ĝia nura frakcio, konsciencie plenumas sian taskon kun konscio pri ĝia ligiteco kun la aliaj kaj valoro por la tuto, des pli bone. Se, male, unuopuloj rigardas siajn agadojn sur apartaj kampoj kiel sole decidajn kaj ekskluzivajn, tuj komenciĝas la danĝero de diserigo. Insistado, ĉefe pro manko de tutecaj perspektivoj, pri nur unu el la multnombraj facetoj, postulato por ĝi ne sole de prioritato, sed eĉ de ekskluziveco, signifas pekon kontraŭ la universaleco de la lingvo kaj eraron rilate la rolon de UEA. Ĝia tasko ne estas favori nur unu flankon, sed flegi paralele kaj adekvate ĉiujn aspektojn kondukantajn al la progresigo de la tuto. Tion koncize esprimas la dua devizo: "Per UEA al la fina celo".

Kial unueco?

Unueco certe ne estas celo al si mem. Forta UEA, unueca en diversecoj, kun multnombra membraro estas necesa kaj el vidpunkto de prestiĝo, kaj el tiu de praktika utiligo de la lingvo. Ju pli da membroj havas UEA, des pli forte kaj prestiĝe ĝi povas aŭdigi sian voĉon kaj des pli efike ĝi povas labori por Esperanto. Plue, ju pli da membroj, des pli granda la verŝajno, ke inter ili troviĝos pli da talentaj kaj kompetentaj aktivuloj, pli da personoj kun elstaraj pozicioj en la socio, kio per si mem altigas la prestiĝon de UEA. Fine, sed ne malplej grave, la nombro de la membroj estas multrilate decida el financa vidpunkto.

Apenaŭ necesas diri, ke la principo de neŭtraleco, kiel formulita en la nuna Statuto, kaj ĝia racia apliko en la ĉiutaga praktiko de la Asocio, estis kaj plu estas unu el la plej esencaj kondiĉoj de unueco en diverseco. Mortigo de neŭtraleco egalas al mortigo de unueco, sekve al detruo de UEA kiel la ĉefa faktoro por la plua organizita disvastigado de la Internacia Lingvo.

Kvankam en la pacienca laŭgrada konstruado de unueco kun respekto por la diferencoj estas farita granda paŝo antaŭen kompare kun 1947-48, tamen la rezultoj povus esti eĉ pli kontentigaj, se ĉiuj komprenus la decidan signifon de tiu principo por la estonteco de Esperanto. La du devizoj — "Unueco estas forto" kaj "Per UEA al la fina celo" — plu restas validaj. En la nuna jaro de elektoj de ĉiuj organoj de UEA, kaj konsiderante la decide gravajn taskojn de la Asocio en la sekva trijara periodo, ĉiuj elekto-organoj kaj la tuta membraro konsciu, ke ili estas eĉ pli aktualaj ol iam antaŭe.

Prof. d-ro Ivo Lapenna

TEKNIKA ESTRARKUNSIDO:

Pri naciismo kaj internacia kunlaboro

LA 8AN DE DECEMBRO okazis en Rotterdam la kutima jarfina, t.n. teknika kunsido en la Centra Oficejo, por solvi diversajn problemojn, kiuj ne postulas ĉeeston de la kompleta Estraro. Ĉi-foje partoprenis la prezidanto de UEA (revet- urante el faka prelegvojaĝo en Svedujo), la estraranoj d-ro Bormann kaj s-ro Woessink, la direktoro de la C.O. kaj la ĵus nomita nova vic-direktoro s-ro Simo Milojević.

La ĉefa temo traktita dum la tuttaga kunsido estis la 59a Universala Kongreso, okazonta en Hamburgo en la fino de julio kaj komenco de aŭgusto. Krom ĝia ĉeftemo, "Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo", estis fiksitaj multaj detaloj de la programo kaj pluraj organizaj detaloj. (Vidu la Oficialan Komunikon sur la paĝo 15.) Ĉar en oktobro finiĝis la ofico de la antaŭa Konstanta Kongresa Sekretario, s-ro Nevan, estas nun ŝargita pri kongresaj aferoj la direktoro de la C.O., kun la helpo de s-ro Milojević kaj aliaj oficistoj.

La diskuto ampleksis ankaŭ la ricevitaĵajn invitojn por okazigo de la Universalaj Kongresoj en 1975 kaj 1976, kaj tre baldaŭ aperos aparta anonco pri la elekto.

Dua ĉeftemo de la kunsido estis la situacio en la Centra Oficejo, kie ŝanĝo de oficistoj kaŭzis en la lasta jaro akumuligon de taskoj kaj gravajn prokrastojn en la aperado de preskaŭ ĉiuj eldon- aĵoj de UEA, precipe la revuo "Esperanto" kaj la Jarlibro. (En la momento de redakto de ĉi tiu numero, tre bedaŭrinde la Dua Parto de la Jarlibro 1973 ankoraŭ ne estas ricevita el la bindejo, kio signifas, ke la membroj povos ricevi ĝin plej frue en la dua duono de januaro.) Feliĉe, la kunsido povis konstati, ke la spertiĝo de la novaj oficistoj dungitaj en 1973 kaj la enkonduko de novaj en la fino de la jaro, precipe la nomigo de nova vic-direktoro, donas perspektivon de rapida reveno al la normala akurateco. Aparte kontentige estas, ke, malgraŭ la menciitaj mankoj, la nombro de individuaj membroj denove kreskis dum la jaro — per ĉ. 3% —, kaj ke en la lastaj semajnoj de 1973 alfluis granda nombro da dumvivaj membriĝoj.



Aplaŭdo por la araba lingvo-politiko

HARSTARIGE eĉ por la plej pesimismaj futurologoj, tiu fora estonteco, pri kiu ili kabinete okupiĝis, ĝia plej pesimisma ĉapitro, komenciĝis jam dum la lastaj monatoj. Eble nur en la fino de mondmilitoj oni tiel abrupte ŝanĝas la temojn en ĉiuj medioj de la amasa komunikado kaj en ĉiuj unuopaj konversacioj de dommastrinoj, renkontiĝantaj por la unua fojo en la urba bazono, kiel tio okazis kaj okazas dum la lastaj monatoj. Je la fino de longaj, homardetruaj militoj, je la akiro de nure juraj sendependeco kaj libereco, post jardekaj aŭ jarcentaj klopodoj tiurilate — ĉiuj parolas pri la paco kaj libereco; dum la lastaj monatoj, ĉiu plej eta gazeteto, radio- aŭ televida stacio, ĉiu interŝtata renkontiĝo kaj ĉiu konversacio dum oni atendas sian vicon ĉe barbiro — temas pri nafto kaj benzino, pri energio kaj ĝia krizo.

Ne ŝanĝiĝis nur la temoj. La sama sorto trafis ankaŭ la heroojn de la gazetaraj artikoloj, televidaj intervjuoj, radio-komentoj kaj unuopaj konversacioj. Ĉefrolas nun, ne plu la kutimaj granduloj de la monda politiko, ne plu la kapricaj aktorinoj kaj operaj primadonoj. La mondan scenejon subite kaj firmipaŝe eniris dozeno da arabaj ŝejkoj, antaŭ kiujn la grandpotencoj sternas ruĝajn tapiŝojn — kvazaŭ ne temus pri realo, kvazaŭ la tuto ŝajnus esti nur fantazie filmita, nekonata epizodo el "1 001 Noktoj", des pli, ke la ŝejkoj ĝentile minacas ĝuste per unu plia, sed definitiva nokto de la terglobo.

En tiu tuta koŝmaro de la finfina, longe atendebla redistribuo de la riĉo, valoro kaj grandeco, kies ĝusta aprezo ne eniras la kompetentojn de nia revuo, aperis ankaŭ pluraj lingvaj demandoj, samtiel mondskuaj, kvankam ne definitivaj, samtiel tuj solvendaj kaj ne plu prokrasteblaj, kiaj estis la aliaj postuloj de la ŝejkoj. Premataj de la samaj problemoj, kiel la cetera mondo, ŝokitaj per la ĝenerala evoluo de la aferoj, eĉ esperantistoj, kiuj ja sekvas, eĉ pasie, ĉiun novan eventon sur la monda lingvo-scenejo, ne sukcesis plene orientiĝi kaj almenaŭ adekvate prinoti tiujn okazintaĵojn.

Fosinte en bone ordigitaj kaj ĝisdataj arkivoj pri la monda lingvo-problemo, oni facile venas al falsa konkludo, ke la plena oficialiĝo de la araba lingvo (kiel oficiala kaj labora) ĉe Unuiĝintaj Nacioj, estas rekta rezulto de la pli fruaj klopodoj tiurilate. La araba jam estis oficiala kaj labora lingvo ĉe pluraj specialigitaj organizaĵoj de UN (Unesko, FAO, ILO kaj WHO), samkiel oficiala kaj labora lingvo de Organizaĵo de Afrika Unueco. Tamen, la nuna rekono de la araba en la monda organizaĵo estis tiel subita, kompleta kaj senrezerva, ke oni ĝin nur helpe de gravaj penstordoj povus rigardi kiel rezulton de tiuj pli fruaj klopodoj. Kontraŭe, ĝi estis rezulto kaj parto de la ĝenerala lastatempa taktiko de la arabaj ŝtatoj, tiu sama, kiu tertreme skuis ankaŭ la ne-lingvajn mediojn kaj kriteriojn.

La tuto eble komenciĝis per plurdeko da samstilaj kaj samenhavaj leteroj, kiujn fine de oktobro 1972 distribuis la libiaj ambasadoj tra la mondo. Kopio de unu el tiuj leteroj troviĝis ankaŭ en nia redakcio, kaj ĝi kun sia tuta stila fajneco kaj majusklaro tekstis jene:

La Ambasado de la Araba Respubliko Libio en Bruselo prezentas siajn komplimentojn al la Diplomatiaj Misioj akredititaj en Belgujo, kaj havas la honoron informi ilin, ke la Registaro de la Araba Respubliko Libio decidis estonte ne plu akcepti ajnan pasporton, se la araba ne estis unu el la lingvoj uzitaj en ĝia redakto. Ĉi tiu decido estas valida ekde la 1-a de januaro 1973.

La Ambasado de la Araba Respubliko Libio en Bruselo kaptas ĉi tiun okazon por renovigi la certigojn pri sia tre alta aprezo de la Diplomatiaj Misioj, akredititaj en Belgujo.

Tiu ĉi letero, kaj plurdeko da similaj, reeĥis preskaŭ bombe tra la mondo. Malfacile troveblas gazeto, kiu almenaŭ ŝerce (kaj tion oni ja plej ofte eĉ faris) ne raportis pri "la nova kaprico" de la ribelema libia junula prezidanto. Ankaŭ nia revuo notis la eventon per iom pli ol 6-linia novaĵo (decembro 1972, p.214). Kaj, kvankam la decido de la libia registaro poste estis modifita per provizora esceptigo de registaraj gastoj, eksterlandaj teknikistoj, konsilantoj ktp., je la difinita dato oni komencis serioze aplikadi ĝin, kio siaflanke revenigis de la libiaj landlimoj plurajn dekojn kaj centojn da diplomatoj, komercistoj kaj turistoj.

Sed tamen, almenaŭ esperantistoj, kiel avangardo de tiuj, kiuj en la hodiaŭa mondo batalas por la egalrajteco de la lingvoj, nek devus nek rajtus en la decido de la libia registaro vidi "kapricon" aŭ ion ajn similan. Libio por sia teritorio postulis nur parton ĝuste de tio, kion Eŭropo kaj Usono jam havas, eĉ ekster siaj teritorioj, kion ili jam delonge envicigis inter "siajn" rajtojn. En la situacio, kiam ne ekzistas ĝenerale akceptita internacia lingvo, — kio pli normala ol tia aŭdaca kaj radikala paŝo de malgranda lando — forpreni la uzurpitan "rajton", la privilegion, kiun al si ĝuigis kelkaj el la t.n. grandlingvoj? Jes, la pasporta decido de Libio efektive havas strangan, preskaŭ ridigan ŝelon, ĝi plie frenezigas la jam kaosan lingvan situacion, sed la kerno, la esenco de tiu decido meritas tondran aplaŭdon de esperantistoj, de ĉiuj, kiuj strebas al egalrajta internacia kunlaboro.

La 17-an de oktobro 1973, finiĝis en Kuvajto konferenco de la Organizaĵo de Arabaj Nafto-Produktantaj Ŝtatoj. Je la fino de la Konferenco oni laŭtleĝis komunikon pri la estonta nafto-produkta politiko, sed — en la araba lingvo. Kiam mondfama ĵurnalisto de eĉ pli fama ĵurnalo demandis, kie li ricevos la anglalingvan tekston de la komunikado, la araboj arogante atentigis lin, ke la anglalingva teksto de la komunikado eĉ ne ekzistas kaj, "se li bezonas ĝin, li


mem traduku". Similaj eventoj ripetiĝis kaj ripetiĝas ĉe ĉiu posta araba renkontiĝo aŭ konferenco.

Ĉio ĉi uragane disblovas la imagojn kaj karto-turojn, kiujn pri siaj propraj grandiozo kaj graveco konstruis ĉirkaŭ si kelkaj "mondlingvoj". Ĉio ĉi estas nenio plia, ol por si mem postuli siajn proprajn rajtojn.

Komence de decembro 1973, antaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko troviĝis propono, ke la araba aldoniĝu kiel plia — sesa laŭvice — labora kaj oficiala lingvo de la monda organizaĵo. La 18-an de decembro 1973, strange, tute sen kontraŭstaroj, estis farita unuanima decido, ke la araba fariĝu unu el la oficialaj kaj laboraj lingvoj de la Ĝenerala Asembleo, ĝiaj komitatoj kaj sub-komitatoj. La 19 arabaj ŝtatoj-membroj de UN konsentis pagi la koncernajn kostojn por la unuaj tri jaroj, kiujn oni por 1974-75 taksas je pli ol 4 milionoj da usonaj dolaroj.

Tia tempesta ascendo de la araba, en unu sola jaro aŭ en kelkaj ĝiaj monatoj nur, al plena rekono en Unuiĝintaj Nacioj, kiel dirite, aldonas plian spicaĵon en la mondan lingvo-kaldronon, spicaĵon apenaŭ manĝeblan, sed ĝi tutcerte, per plia kaosigo de la lingva demando, decide kontribuas al la konsciigo de la homaro pri la graveco kaj aktualeco de komuna internacia komunikilo. Eble la araba nafto-politiko ne meritas aplaŭdojn, kvankam verŝajne niaj nepoj dankos ĝuste la arabojn, ke ili tiel frue surscenigis al ni la epokon, kiam ĉiuj nafto-rezervoj elĉerpiĝos. La araba lingvo-politiko estas afero, kiu plej rekte koncernas ankaŭ nin esperantistojn, kaj ĝi meritas nian senrezervan apogon kaj admiron. Ĝi estas akvo por nia muelilo.


Simo Milojević



Unuiĝintaj Nacioj: La adopto de la araba paneigis la tutan interpret-sistemon. Kiam la monda organizaĵo rezignos pri la aŭskultiloj kaj lingva kaoso?

**DU PLIAJ LABORLINGVOJ KOSTOS
MILIONOJN AL UNUIGINTAJ NACIOJ:**

La vitra Babel-turo



Ampleksigita uzo de la ĉina kaj araba lingvoj en la laboro de Unuiĝintaj Nacioj minacas ne nur kompletan kaj definitivan "babeliĝon" de la novjorka sidejo de la internacia organizaĵo, sed ĝi krom tio ŝargas ankaŭ la buĝeton de UN per pliaj milionoj da dolaroj. Pri ĉio ĉi jam raportis la tutmonda gazetaro, kiel atendeble — ne ĉiam ĝuste aprezante la problemojn, kiujn kreas la multlingveco. Nia usona kunlaborantino Roan Orloff Stone prizorgis por nia revuo la raporton kiun vi legas ĉi-paĝe.

LA PALACO de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko minacas definitive kaj komplete transformiĝi en 38-etaĝan Babel-turon, kiam UN faros la ĉinan lingvon plena laborlingvo kaj kiam realiĝos la postuloj, ke la araba estu la sesa laborlingvo de la mondorganizaĵo.

Eĉ se okazos nur modera realigo de ĉio ĉi, dum la nuna kaj la sekvanta jaroj, la ampleksigita uzo de la ĉina lingvo ŝargos la dujaran buĝet-periodon 1974-75 per plia miliono da dolaroj. La uzo de la araba kostos eĉ multe pli, ĉar tiu programo estas komplete nova.

La tuto postulos videblajn ŝanĝojn ankaŭ en la salonegoj de la Ĝenerala Asembleo, Sekurec-Konsilantaro kaj aliaj kunvenejoj de la ĉefa konstruaĵo, kiuj ja povas provizi samtempan tradukadon en ne pli ol kvin lingvoj, kaj nun do devus akcepti la sesan. En la praktiko, dum la unuaj 25 jaroj de la ekzistado de UN, malofte estis pli ol kvar interpretistaroj funkciantaj en Unuiĝintaj Nacioj, ĉar la tiutempa ĉina delegacio (Tajvano, kiu ĉeestis ĝis la jaro 1971), kutimis paroli angle, interalie ankaŭ por malpezigi la ekonomian ŝarĝon de la Sekretariejo.

Kun la alveno de la reprezentantoj el Pekino, tiu kutimo neatendite ĉesis kaj ĉiuj paroladoj de la ĉinaj reprezentantoj okazas en la ĉina lingvo. La pliigita laborŝarĝo trostreĉis la stabon de 13 interpretistoj, kies nombro preskaŭ duobliĝis de post tiu tempo. Eĉ nun, tamen, okazas embarasigaj eventoj en la Sekurec-Konsilantaro, ekz. kiam help-interpretisto malfruas.

La Konsila Komitato pri Buĝetaj Aferoj taksas, ke plena uzo de la ĉina lingvo en 1974-75 devigus al Unuiĝintaj Nacioj presigi 18 000 paĝojn da tradukoj anstataŭ la malmultaj nun presataj. Fari tion signifus dungi 84 ĉinlingvajn spertulojn aldone al tiuj nun en la paglisto, kaj 16 portempajn postenulojn dum la ĉiujaraj sesioj de la Ĝenerala Asembleo.

La Ĝenerala Sekretario Kurt Waldheim sugestis "pli singardan kaj pragmatan traktadon", celante nur 8 000 paĝojn da tradukoj ĉiujare por la unua etapo, celo, kiun estus eble atingi per rekruto de 30 plentempaj deĵorantoj kaj ok portempuloj.

Krome, estas malfacile trovi bonajn interpretistojn kaj tradukistojn, kaj la Ĝenerala Sekretario atentigis, ke eĉ la malpliigita nombro da postenoj ne estos okupita dum la unua jaro. La pli granda agado signifos ankaŭ pli multekostan oficejon en meza Manhattan; ĉar la 38-etaĝa Sekretariejo jam de longe ne havas sufiĉan lokon. Sed la plej granda afero ja estos salajroj, pli ol 80% de la pritaksita sumo de 1 050 000 us. dolaroj.

Kvankam precizaj buĝetaj kalkuloj ankoraŭ ne estas haveblaj por aldoni la araban lingvon al la laborlingvoj, oni povas certi, ke tio postulos ŝanĝojn, ekde pliaj interpretistaj budoj en la Asembleo-salono, la Konsilantarejo, kaj deko da kunvenejoj, ĝis modifo de la tuta aŭskulta ilaro. Sidlokoj por delegitoj, la ĵurnalistaro kaj la publiko — ĉ. 7 100 entute — estas konektitaj por ricevi samtempan interpretadon de nur kvin lingvoj — la angla, franca, hispana, rusa kaj ĉina nuntempe.

Almenaŭ 18 interpretistoj estus bezonataj por komenci la arablingvan laboron, kaj la aldono postulus pliiĝojn en la kvin ekzistantaj lingvoj ankaŭ. Jen estas la problemo — angla-arablingvaj aŭ eĉ angla-franca-arab-lingvaj parolantoj eble estus relative multnombraj en Usono, sed arablingvaj parolantoj, kiuj kapablas samtempan interpretadon de la ĉina aŭ rusa lingvoj, estas maloftaj.

Oni jam scias pri la klopodoj akiri por aliaj lingvoj oficialan rangon, kio vekas eĉ aldonan timon en la vitra Babelturo ĉe la rivero East en Novjorko.

Esence diferenca de la cetera mondo

Sur la sekvantaj paĝoj ni aperigas ampleksan kontribuadon de la japana esperantista pioniro Kurisu kei, kiun li verkis laŭ instigo de nia kunlaboranto Ulrich Lins. Necesas mencii, ke la manuskripto estis multe pli ampleksa kaj ke ni devis plurloke draste koncizigi ĝin. Krome aldonendas, ke nia redakcio ne samopinias kun pluraj ideoj esprimitaj en la artikolo, kaj se ni tamen decidigis pri ĝia aperigo — ni celis almenaŭ parte mildigi la ĝeneralan soifon pri fidindaj informoj, kiuj povus prilumi la nunajn poziciojn de la Internacia Lingvo en la plej multnombre loĝata ŝtato de la terglobo. La prezentata artikolo, niaopinie, pravas unu plian fojon, ke la ne-ĉinaj metroj verŝajne grave maltaŭgas por per ili mezuri la ĉinajn eventojn, inkluzive de la tiea Esperanto-movado.

SENDUBE multaj legantoj scivolas, kia estas la nuna situacio de Esperanto en Ĉinujo, ĉar oni preskaŭ nenion scias pri ĝi krom tio, ke tie ĉiumonate aperas belaspekta kaj sufiĉe ampleksa informa gazeto *El Popola Ĉinio* kaj de tempo al tempo eldoniĝas Esperantaj libroj, ĉefe tradukaĵoj de verkoj de Prezidanto Maŭ zedong. Tiom pli estis salutinda la vizito de 3-membra delegacio de Ĉina-Esperanto-Ligo (ĈEL), estrita de ĝia vicprezidanto Je lajŝi, al la 60a Jubilea Kongreso de Japanaj esperantistoj, okazinta meze de la lasta aŭgusto en Kameoka, centro de Oomoto. Ŝajnas, ke la glacio, kiu tiel longe baris la ĉinajn esperantistojn kontraŭ la mondo, fine komencis degeli.

Dum sia restado en Japanujo, pri la situacio de Esperanto en sia lando, tamen, niaj ĉinaj gastoj parolis nur malmulte. Ankaŭ ni, japanaj esperantistoj, ĝenerale agis takte kaj ne ĝenis ilin per demandoj, kiujn ili eble ne povus respondi kontentige, komprenante la delikatan situacion en kiu verŝajne troviĝas Esperanto en ilia lando. Ĉe tio ĝustatempe helpis nin raportoj de du japanaj esperantistoj, kiuj antaŭ nelonge, unu post la alia, vizitis Ĉinujojn, kie ili havis rarajn okazojn renkontiĝi kaj interparoli rekte kun tieaj esperantistaj aktivuloj. Ĉar ĉiuj tiuj raportoj estas japanlingvaj, mi nun volas mallonge prezenti ilin.

Unu el tiuj du japanoj estas Sakai maturarō, malnova esperantisto, aktivulo de la antaŭmilita Japana Prolet-Esperantista Unio (JPEU). Li vizitis Ĉinujojn dum junio-julio 1972 verŝajne por kunordigi komercajn aferojn, estante estrarano de “Tōhō Syoten” (Orienta Librejo) en Tokio, kiu importas eldonaĵojn el Ĉinujo kaj ankaŭ eldonas japanlingvajn lernolibrojn de la ĉina lingvo. Post reveno hejmen, li publikigis en la n-ro 10 (nov. 1972) de la revuo *Syūhen* (Ĉirkaŭaĵo) artikolon “Esperanto no hanasi” (Esperante eble: Iom pri Esperanto) kun subtitolo “Renkontiĝante kun ĉinaj (esperantistaj) kamaradoj”.

Sakai renkontiĝis kaj amike interparolis en Pekino kun junaj aktivuloj de ĈEL. Laŭ li, la ĉina Esperanto-movado nun estas portata ĉefe de homoj relative junaj, ankoraŭ en siaj 20-aj kaj 30-aj jaroj; la agadstilo de la tiea Esperanto-movado tute diferencas de tiu en kapitalismaj landoj kiel Japanujo, precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio (de nun mallonge GPKR). Nome, antaŭ ĝi esperantistoj ĉiudimanche kunvenis, konversaciis, diskutis ktp. en Esperanto, sed nun ne plu. Ne okazas plu ankaŭ informado pri Esperanto nek kursoj. Antaŭe en Pekina Fremdlingva Lernejo oni oficiale instruis ankaŭ Esperanton, sed ankaŭ tio ne plu okazas. Kiel do tie oni fariĝas esperantisto? Nu, ĉefe per memlernado. Kaj kiam oni certgrade perfektigis, oni ricevas taskon kiel membro de ĈEL. Tiu tasko estas labori en la Esperanta sekcio de Fremdlingva Eldonejo, ŝtata institucio, kiu eldonas i.a. *El Popola Ĉinio*, verkojn de Maŭ zedong en Esperanta traduko. Eĉ el la mallonga informo de Sakai klare ŝajnas, ke ne nur laŭ “agadstilo” sed esence la Esperanto-movado en Ĉinujo nun tute diferencas de la Movado en la cetera mondo. Kaj mi eĉ dubas serioze, ĉu Esperanto-movado, kiu ne okupiĝas pri disvastigo de la lingvo nek pri instruado de Esperanto, sed verŝajne utiligas ĝin por informado pri la ŝtato, rajtas esti nomata Esperanto-movado.

Ĉi-rilate ni plue legu, kion raportas alia japana esperantisto, Tokuda rokurō, UEA-delegito en Sizuoka. Li vizitis Ĉinujojn dum februaro-marto 1973 kiel membro de japana kultura delegacio, gvidita de s-ro Toki zenmaro, bone konata utaisto kaj ankaŭ esperantisto. Tiun delegacion organizis, kiel kutime, Asocio por Kulturaj Interŝanĝoj inter Ĉinujo kaj Japanujo, kiu fiere nomas sin ortodoksa, bone konsciante, ke ĝi ĝuas plenan subtenon de Pekino — difference de alia asocio, kiun dominas la Komunista Partio de Japanujo.

KURISU KEI, naskiĝis en 1910, esperantigis en 1930 kaj estis aktivulo en Japana Prolet-Esperantista Unio. Poste aktivis en la organizo "Marŝu", fondis (1935) literaturan "Maja Rondo".



Samtempe, kiel membro de IAREV (Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj) kontribuis al ĝiaj organoj "Proleta Literaturo" kaj "Internacia Literaturo". Esperantigis la faman romaneton "Krab-ŝipo" de la japana proleta verkisto Kobayasi takizi, sed pro likvidiĝo de la eldonejo kiu mendis la tradukon (EK-RELO), en 1951 aperis nur slovaka traduko estiĝinta surbaze de la Esperanta. En 1949 aperis du japanaj libroj, kompilitaj de Kurisu ("La sama suno lumigas la mondon" kaj "Voĉo de l' mondo"), kiuj al la aŭtoro portis "Ossaka-Premion" de la japana esperantistaro. Kurisu multe tradukis el la ĉeĥa kaj slovaka kaj ĝenerale estas rigardata kiel specialisto pri Ĉeĥoslovakio (En 1959-61 li estis lektoro de la japana lingvo ĉe Karel-Universitato en Prago). Lastatempe publikigis plurajn japanlingvajn artikolojn pri Esperanto.

Reveninte hejmen Tokuda publikigis, kiom mi scias, du raportojn en la japana lingvo. La unua, sufiĉe longa, "Mia vizito al Ĉinujo — Esperantistoj en Pekino", serie aperis en la aprila, maja kaj julia numeroj 1973 de *Nova Vojo*, kiun eldonas Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, kaj la dua, malpli longa, "Vojaĝante en Ĉinujo", aperis en la junia-julia numero de *La Verda Kolombo*, organo de Japana Pacdefenda Esperantista Asocio, sekcio de MEM. Evidente li havis multe pli da okazoj kontakti ĉinajn esperantistojn kaj paroli kun ili, ol Sakai. Jam la unuan oficialan bankedon por la japana delegacio fare de Ĉina-Japana Amikec-Asocio kaj Popola Asocio por Amikeco kun Eksterlando ĉeestis reprezentanto de *El Popola Ĉinio*, Ĉang ĝe, kiu sidis apud Tokuda. Ankaŭ la duan oficialan bankedon aranĝitan de tri eminentaj ŝtatistoj, Guo moĵuo, verkisto kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso, Liaŭ ĉengĝi, prezidanto de Asocio por Kulturaj Interŝanĝoj inter Japanujo kaj Ĉinujo, kaj Hujucz, membro de la Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanto de ĈEL, ĉeestis ne nur Hujucz, sed ankaŭ Je lajŝi, kiuj sidiĝis ambaŭflanke de Tokuda. Ĉina Esperanto-Ligo do estis reprezentita tie kaj de sia prezidanto kaj de sia vicprezidanto. Sed kiel Tokuda mem kun bedaŭro konstatis, en la sekvanta tago *Jenmin Ĵibaŭ* (Popola Ĵurnalo), ĉiutaga organo de K.P.Ĉ., menciis en raporto pri la bankedo Hujucz nur kiel membron de la Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso, ignorante, ke li estas ankaŭ la prezidanto de ĈEL. Kaj tiun ekzemplon sekvis ankaŭ *El Popola Ĉinio*, kiam ĝi raportis pri tiu bankedo en sia maja numero.

Tuj post la bankedo vizitis lin en la hotelo Hujucz kaj Je lajŝi, kaj tiel li povis kun ili longe paroli kaj interŝanĝi opiniojn. Kiel Hujucz mem tiam rakontis al

Tokuda, li lernis Esperanton antaŭ 60 jaroj en Parizo, kie li studis, kaj de tiam li ludadis pioniran rolon en la ĉina Esperanto-movado. Li nun plenumas gravan laboron kiel membro de la Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso prizorgante diplomatajn aferojn kaj kulturajn rilatojn kun eksterlando. Ankaŭ Je lajŝi (pseŭdonime Ĵelezo) estas sufiĉe malnova esperantisto. En la dua duono de la 30-aj jaroj li lernis Esperanton en Tokio, kie li studis la anglan literaturon. Post forpelo fare de la japana registaro pro strata manifestacio de ĉinaj studentoj kontraŭ la japana invado, kiun li partoprenis, Je fariĝis unu el la gvidantoj de la revolucia Esperanto-movado en Ĉinujo. Kaj kiam la japana armeo okupis Ŝanhajon, la centron de la movado, li kun kamaradoj daŭrigis sian agadon en aliaj ankoraŭ neokupitaj urboj, eldonante revuojn kiel *Ĉinio hurlas*, *Heroldo de Ĉinio* k.a., informante per Esperanto la internacian publikon pri la kontraŭjapanaj bataloj de ĉinoj kaj alvokante solidaran helpon kaj kunagadon. Li estis gvidanto ankaŭ de la latiniga kaj skribreforma movadoj (de la ĉina lingvo) kaj ankoraŭ nun okupas gravan postenon kiel ĝenerala sekretario de la Skribreforma Komitato ĉe la Akademio de Sciencoj, kies prezidanto estas Guo moĵuo.

Je malkaŝis al Tokuda interesan epizodon, ke, kiam post la liberiĝo oni diskutis, kiel transskribi la elparolon de la norma ĉina lingvo, Soveta Unio proponis, ke oni alprenu la kirilan alfabeton, sed ĉinaj esperantistoj la unuaj kontraŭis tion, tiel, ke oni fine alprenis la latinan alfabeton. Ĝuste en la tempo, kiam la japana kultur-delegacio vizitis Pekinon, Je vizitadis la t.n. lernejon de la 7a de majo apud la ĉefurbo, laborante tie duontage. Lernejoj kun tiu nomo, konataj ankaŭ kiel kadrullernejoj, fondiĝis tra la lando laŭ instrukcio de Maŭ zedong de la 7a de majo 1966, por ke la kadruoj, t.e. gvidaj funkciuloj de registaraj kaj publikaj institucioj, verkistoj, artistoj, sciencistoj, studentoj ktp., remuldu sin ideo tra korpaj laboroj.

Ĉe bonveniga kunveno komune aranĝita por li fare de la Esperanto-sekcio de Fremdlingva Eldonejo, la redakcio de EPĈ kaj la libroservo de ĈEL, Tokuda konatiĝis kun alia malnova aktivulo, Fang ŝanĉing, konata per la pseŭdonimo Tikos, kiu antaŭ la milito redaktis la gazeton *La Espero* en Hankoŭ kaj kunlaboris en *La Mondo*, riĉenhava kaj altnivela gazeto en Ŝanhajo, siatempe servinta al japanaj revoluciaj esperantistoj kiel modelo. Eldonaj kaj redaktaj laboroj verŝajne okupas grandan parton de la esperantistoj en Pekino, kies nombro estas taksata je ĉ. 100. Laŭdire ĈEL havas ĉ. 500 anojn tra la lando, sed Tokuda povis renkontiĝi kun neniuj esperantistoj en aliaj urboj, kiujn vizitis la delegacio. En Ŝanhajo li klopodis renkontiĝi kun Bakin, bone konata verkisto kaj esperantisto, kiu antaŭmilita i.a. tradukis ĉinlingven la novelon de Baghy *Printempo en la aŭtuno* kaj siavice verkis ĉinlingve novelon *Aŭtuno en la printempo*, sed li ne sukcesis. Nelonge antaŭe, japana gazeto raportis, ke Bakin ie vizitadas lernejon de la 7a de majo.

Japana Esperanto-Instituto aranĝis por la delegacio de ĈEL bonvenigan bankedon, kiun ĉeestis ĉ. 30 personoj. Sur nia foto (de maldekstre): s-ro Ĉen juan, ĝenerala sekretario de ĈEL, s-ino Isiguru, edzino de nia komitatano s-ro Isiguru, s-roj Tokuda, Kawakami, Je lajŝi, vicprezidanto de ĈEL kaj Ĝu mingji, estro de E-sekcio de la Fremdlingva Eldonejo. (Fotis s-ro Muramatu yukijosi).



Tamen, kvazaŭ por kompensi tion, en Ŝanhajo, kiam la delegacio vizitis elementan lernejon, oni donis al Tokuda okazon paroli iom pri Esperanto al la lernantoj de la sesa-jara klaso dum la horo de la rusa lingvo. Li do parolis al ili proksimume jenon: La plej multe uzata lingvo de la mondo estas nun la ĉina, ĉar Ĉinujo havas ĉ. kvaronon de la monda loĝantaro. La japanan lingvon uzadas pli ol cent milionoj da homoj. Ĉinoj kiel ankaŭ japanoj devas havi fieron kaj fidon je siaj propraj lingvoj. Sed en la mondo ekzistas ankoraŭ multaj aliaj landoj. Mi aŭdis, ke Ĉinujo restarigis diplomatajn rilatojn kun pli ol 90 landoj. Mi do supozas, ke, kiam vi kontaktos homojn el diversaj landoj de la mondo, certe ne sufiĉos la rusa lingvo, kiun vi nun lernas. Mi do ne povas ne deziri al vi, ke vi lernu krom la rusa lingvo ankaŭ la komunan lingvon, apartenantan al neniuj nacio, nomatan Esperanto.

Kiam la interpretisto, kiu akompanis la delegacion, interpretis ĉinlingven la japanlingvan parolon de Tokuda, la juna instruisto afable rekomendis al siaj lernantoj, ke ili lernu ankaŭ Esperanton, kiel ĵus konsilis al ili la "onklo" el la najbara lando. Tiel li neatendite povis informi pri Esperanto en ĉina elementa lernejo.

Tokuda diras, en sia raporto publikigita en *Nova Vojo*, ke pro manko de organizo ne plu okazas en Ĉinujo esperantistaj studkunvenoj, ekskursoj ktp., kiaj okazis antaŭ GPKR, tiel ke ankaŭ kontakto inter la membroj de ĈEL ankoraŭ ne estas restarigita. Tio verŝajne respondas al la jam menciita konstato de Sakai. La diro de Tokuda, ke nun en Ĉinujo mankas organizo de esperantistoj, certe iom strange impresas, ĉar ja ekzistas ĈEL. Eble li volis diri, ke *praktike* mankas organizo, tial ke ĈEL ĉesis funkcii. Efektive en sia alia artikolo, publikigita en *La Verda Kolombo*, li diras ke la agado de la tutlanda organizaĵo restas haltigita. Sed, laŭ li, tio signifas nur, ke ĝi estas nun reordigata, kaj li citas

opinion de Hujucz, ke la Esperanto-movado en Ĉinujo vige disvolviĝos post kompletigo de reordigo.

Ŝajnas do, ke ĈEL nun estas kvazaŭ skeleto kun nur siaj prezidanto (Hujucz), vicprezidanto (Je lajŝi) kaj ĝenerala sekretario Ĉen juan, kiu cetere estis unu el la tri ĉinaj delegitoj al la 60a Japana Esperanto-Kongreso. Neekzisto de organo kvazaŭ simbolas la situacion, en kiu nun troviĝas ĈEL. Kaj tio ja ne ekestiĝis dum aŭ kiel sekvo de GPKR, sed antaŭ multaj jaroj, ĉar kun la malapero de *Popola Mondo* komence de 1952 ĈEL perdis sian organon. Ŝajnas, ke ekde la malapero de *Popola Mondo* la Esperanta movado en Ĉinujo ĉiam pli vegetadis kaj povis ekzisti nur en kripligita formo. Ni povus konkludi, laŭ la raportoj de sinjoroj Tokuda kaj Sakai, ke en Ĉinujo nun Esperanto ekzistas nur por informadi eksterlanden pri la oficiala vero. Tiu-cele oni ja bezonas nur kelkdekon da kvalifikitaj esperantistoj, t.e. laborantoj de la redakcio de EPĈ, de la Esperanta sekcio de Fremdlingva Eldonejo, de la libroservo de ĈEL, kaj de la Esperanta sekcio de Pekina Radio.


Sed, kio mirigas min, estas, ke niaj du japanaj vojaĝintoj verŝajne opinias alimaniere. Jen ni vidu, kiel ili pritaksas la nunan pozicion de Esperanto en Ĉinujo: Tokuda en sia artikolo en *Nova Vojo* konklude diras, ke li ricevis impresojn, ke neniuj landoj en la mondo tiel ĝuste pritaksas kaj komprenas la esencon de Esperanto kaj efike utiligas ĝin kiel Ĉinujo, ke al li ŝajnas, ke iusence la spirito de Zamenhof estas plej fidele heredita ĝuste en Ĉinujo. Ankaŭ en sia raporto al *La Verda Kolombo* li diras: "Kio min feliĉigis tra la nuna vojaĝo estas la konstato, ke oni ĝuste pritaksas Esperanton." Kaj plue: "La nunaj gvidantoj de Ĉinujo portas nenian antaŭjuĝon kontraŭ Esperanton, ĉar ili senpere vidis la efikan servon de Esperanto."

En laŭdado de la situacio de Esperanto en Ĉinujo tamen Sakai estas eĉ pli entuziasma. Li skribas: "La

poresperanta eldonagado en Ĉinujo estas tre vigla. Preskaŭ ĉiuj verkoj de Maŭ zedong estas tradukitaj kaj eldonitaj en Esperanto. Krom tio ankaŭ gravaj dokumentoj kiel gvidartikoloj de *Jenmin Ĵibaŭ* kaj legaĵoj pri aktualaj temoj estas amase eldonataj. Kaj oni eldonadas belegan gazeton nomatan *El Popola Ĉinio*, ĉiunumere 60-paĝa, riĉe ilustrita per koloraj fotoj, kian oni nur malofte vidas inter la Esperantaj gazetoj de la tuta mondo. Sed en nuna Ĉinujo oni ne povas vidi la Esperantan movadon, kian oni vidas en kapitalismaj landoj kiel Japanujo. Sekve esperantistoj eble seniluziiĝos, kiam ili ekvidos la ĉinan Esperanto-movadon per la okuloj alkutimiĝintaj al la Esperanto-movado en Japanujo, dirante: "En Ĉinujo ne ekzistas Esperanta movado!" Kiu estas la vera Esperanta movado? Al tiu ĉi demando oni respondos alimaniere laŭ siaj starpunktoj, tamen mi persone ne povas ne pensi ankoraŭfoje, kiel unu el tiuj, kiuj travivis la proletan Esperanto-movadon en Japanujo dum la 30-aj jaroj, ke ĝuste en nuna Ĉinujo ekzistas ja vera Esperanto-movado."

Vere strangaj vortoj, ĉu ne? Mi mem neniel povas dividi tian opinion kun mia iama kolego Sakai malgraŭ tio, ke ankaŭ mi travivis same kiel li la proletan Esperanto-movadon en Japanujo dum la ŝtormaj 30aj jaroj.


Kio koncernas la nunan Esperanto-movadon en Japanujo, ankaŭ pri ĝi mi estas ne tute kontenta; ĝi havas multajn mankojn kaj ĝi estas plibonigenda kaj reformenda, laŭ mia opinio eĉ radikale. Sed ĝi almenaŭ havas sian tutlandan organizaĵon en formo de Japana Esperanto-Instituto, kiu monate eldonas presitan organon *La Revuo Orienta*. Krom ĝi ekzistas en Ōsaka sufiĉe forta regiona centro: Kansai-Ligo de Esperanto-Grupoj kun sia same presita organo monata *La Movado*, kiu servas kiel komuna organo ankaŭ al la ceteraj tri regionaj Esperanto-Ligoj el la okcidenta duono de Japanujo. En Kioto ofsete aperadas malgranda sed serioza, sufiĉe altnivela revuo dumonata *l'omnibuso* tute en Esperanto. En Tokio jam delonge ekzistas ankaŭ serioza kaj altnivela revuo kvaronjara, kvankam nur en multobligita formo, *Nova Rondo*, kiu okupiĝas ĉefe pri studo kaj analizo de la Esperanto-movado, redaktata dulingve: japane kaj Esperante. El mezjapana urbo Numazu aperas multobligita monat-gazeto *La Verda Kolombo* jam menciita. Kaj en Kameoka aperadas du presitaj gazetoj, kvankam per la manoj de religia



Renkontiĝo en Pekino (de maldekstre): s-roj Je lajŝi, Tokuda kaj Hujucz.

movado, nome *Oomoto*, tute en Esperanto, kaj la jam menciita *Nova Vojo* japane kaj Esperante. Pere de ili ni povas instrui, lerni, studi Esperanton, informi, diskuti, eĉ polemiki pri la Esperanto-movado en kaj ekster Japanujo, kunordigi la movadon ktp. Ni povas eldoni aŭ eldonigi lernolibrojn, vortarojn ktp. de Esperanto, tute libere organizi Esperanto-kursojn kaj se necese ankaŭ okazigi publikajn kunvenojn por informi pri Esperanto. Ni povas ankaŭ tute libere, ĝenate aŭ malhelpate de neniu, korespondadi per Esperanto kun popoloj el ĉiu ajn lando de la mondo, nur se ankaŭ la popoloj en la koncernaj landoj ĝuas liberon korespondi kun ni, pri ĉiu ajn temo, eĉ pri temoj neagrablaj kaj nedezirindaj por la nuna registaro de Japanujo. Ni povas ankaŭ vojaĝi eksterlanden eĉ individue, ne nur kiel oficialaj delegitoj, kien ajn, nur se la aŭtoritatoj de la koncernaj landoj permesas tion ...

Mi do malsame kiel Sakai multoble preferas la nunan Esperanto-movadon en Japanujo kun ĉiuj ĝiaj mankoj ol tiun en Ĉinujo. Mi ne dubas, ke ankaŭ multaj aliaj esperantistoj opinios simile pri la Esperanto-movado en siaj landoj, kiam ili komparos ĝin kun tiu en Ĉinujo, kiun mi mallonge priskribis supre laŭ la freŝaj raportoj de sinjoroj Tokuda kaj Sakai. Tion farante mi havis antaŭ mi nur unu celon: informi pri la efektiva situacio de Esperanto en Ĉinujo, por ke oni serioze pripensu, kiel kunhelpi la ĉinajn esperantistojn. Kaj mi forte esperas, ke la reordigo de la ĉina Esperanto-movado, menciita de Hujucz kaj Tokuda, iros paŝon post paŝo en tiu direkto.



Ĉu la Fremdlingva Eldonejo el Pekino baldaŭ reaktiviĝos en la eldonado de valoraj verkoj de la ĉina beleto?


Preskaŭ ignorata de la vasta publiko

Pro redakcia pretervido, tiu ĉi kontribuaĵo ne trovis lokon en niaj novembra aŭ decembra n-roj. Ĝia informa enkonduko grave malaktualiĝis, sed ni volonte disponigas la spacon pro la analizaj alineoj. Ĝi refoje starigas la demandon de la esperantista kutimo provoki pli da bruoj ol propraj oreloj povas elteni, pli da intereso ol eblas kontentige respondi. La Pupteatra Internacia Festivalo de Zagreb verŝajne ne estas tiel grandioza kia ĝin emas vidi kelkaj ĝiaj organizantoj, sed ĝi certe estas multe pli granda kaj grava ol opinias tiuj kiuj ĝin emas kritike rigardi aŭ ignore prisilenti.

En la pasintaj ses jaroj, en la kadro de la Pupteatra Internacia Festivalo de Zagreb, okazis ĉirkaŭ 300 prezentaĵoj por proksimume 100 000 spektantoj!

NE, NE ESTAS TROAJ NULOJ. Bone vi legis. La 30 profesiaj pupteatroj el 12 landoj, kiuj partoprenis la ses ĝis nun okazintajn PIF-ojn prezentis entute pli ol 300-foje siajn spektaklojn antaŭ publiko, taksata je ĉirkaŭ cent mil personoj.

La 6-an PIF-on, kiu okazis de la 1-a ĝis la 6-a de oktobro en Zagrebo (kaj ĝiaj apudurboj Sisak kaj Karlovac) partoprenis elstaraj trupoj el Pollando, Hungarujo, Bulgarujo, Rumanujo, Jugoslavio kaj Indonezio (ĉi-lastaj bedaŭrinde eksterkonkurence, nacilingve).



Ĉe la lasta PIF, la Pupteatro el Lublin (Pollando) prezentigis per "Malnovpola triptiko".

La unuan premion de la faka ĵurio merite ricevis la bulgara pupteatro pro sia spektaklo "La scivola elefantido", kiu per sia lerta ombroludo egale ravis etulojn kaj grandulojn. La unuanimecon de la prijuĝo pravas la fakto ke ĝi ricevis ankaŭ la premion de la infanĵurio konsistinta el 43 esperantistaj geknaboj el Italujo, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Jugoslavio. Apartan ĝuon donis, eksterkonkurence, E-lingva programo de amatora infana pupteatro el Košice (Ĉeĥoslovakujo). Ĉiuj prezentaĵoj estis en rimarkinde bona Esperanto. Nur per tre malgranda poento-diferenco, la Pupteatro el Niš gajnis la premion de la esperantista lingva ĵurio. Tiu ĉi Festivalo, konsiderebla kiel unu el la ĉefaj kulturaj atingiĝoj de la E-movado en la lasta jardeko, servis kiel enkonduko al granda polemiko en Kroata gazetararo pri la rolo de Esperanto.

La argumentoj de la esperantistoj estis la jenaj:

- pli multe da personoj en Zagrebo komprenas Esperanton ol ekzemple la rumanan aŭ la polan;
- la Festivalon ĉeestis ankaŭ infanaj grupoj el eksterlando;
- la Festivalon partoprenis infanoj el Zagrebo, kiuj lernas Esperanton;
- la pupistoj, lerninte eĉ nur sian rolon en Esperanto, akiras sufiĉan pasivan konon kaj eĉ parte aktivan scion de la lingvo, kaj do pli bone komprenas esperantlingvajn prezentaĵojn de la gekolegoj ol nacilingvajn;
- por la neesperantista parto de la publiko estas pli facile trovi komentariantojn kiuj komprenas Esperanton ol tradukistojn el la rumana, slovaka, ktp.

Ĉar efektive Esperanto estis kontestata esence kiel festivala sceneja lingvo, la kutimaj ĝeneralaj argumentoj ĉi tie ne povis esti multe uzataj.

La polemiko ankoraŭ daŭras en la momento kiam mi skribas, do ne estas eble diri ĝis kia grado la ĵurnalistoj malkovros niajn malfortajn flankojn. Tamen, estas



Artistoj el Niš (Jugoslavio): Post la lernitaj roloj por PIF, ili decidis lerni la lingvon. (La foton sendis s-ro J. Nešić).

utile mem konsideri ilin, por provi ilin estonte plibonigi.

Estas vero ke en Zagrebo, la Zamenhofajn vesperojn kutimis ĉeesti (antaŭ kelkaj jaroj) ĉirkaŭ ducent personoj kaj do, ke en la urbo estas almenaŭ tiom da geesperantistoj. Tamen, enkalkulante la ĉiam tro okupitajn organizantojn ne pli ol trideko el ili vidis almenaŭ unu spektaklon de PIF. Kaj kie estis tiuokaze ekzemple la eksterlandanoj, kiuj plendis pri la “amatoreco” de la programo de la Beograda U.K.? En PIF ili povus vidi nur profesie alte taksatajn prezentaĵojn. Tamen, se oni flankenlasas la akompanantojn de la infanaj grupoj, PIF-on ĉeestis sume tri eksterlandaj esperantistoj! Kiel povas esti ke la esperantistoj, kiuj plendas pri la antaŭjuĝoj de aliaj rilate Esperanton ankoraŭ pro nura antaŭjuĝo ne konsideras la pupteatron kiel arton egalan al la aktora teatro? En PIF ili povus vidi ne nur Andersen-on sed ankaŭ Shakespeare-on (“Sonĝo de somermeza nokto”, traduko de Kalocsay, plenumo de la Budapeŝta Pupteatro)!

Due, kiom signifas 43 infanoj kiuj komprenas (sincere dirite, ne ĉiam bone) Esperanton apud 1500-2000 kiuj ne komprenas? Kial do la instruistoj en lernejoj kie Esperanto estas instruata ne komprenas, ke PIF povas esti la krono de ilia tutjara laboro, malgraŭ daŭra invitado de la zagrebanoj al reciproka gastigado por malgrandigo de la kostoj? La havigo de forpermeso dum la lerneja jaro ne ĉiam estas tiel komplika kiel ĝi ŝajnas (la pruvo estas, ke tiuj, kiuj volis, havis ĝin).

En la 30 urboj, kiuj sendis pupistojn (entute ĉ. 500) al la ĝisnunaj PIF-oj, kiom estis farite por provi efektive esperantigi ilin? Kial, malgraŭ ripetaj alvokoj, nur en Danlando kaj Jugoslavio regule okazas turneoj de pupteatroj kun la plej bonaj spektakloj el PIF? Se

post la Festivalo, la pupistoj ne plu havas la okazon eĉ prezenti refoje sian spektaklon, ili nepre baldaŭ perdos la kontakton kun Esperanto. Aliflanke, kial la esperantistaj organizaĵoj ne komprenas ke la aranĝado de kulturaj esperantlingvaj spektakloj ankaŭ por ĝenerala publiko estas eksterordinara propagando, kaj ke ĝi kreskigas la prestiĝon de la lingvo?

Roger Imbert

Dulingva instruado deviga

FEDERACIA (tutusona) juĝisto ordonis antaŭ ne-longe, ke la urbo Portales en la usona ŝtato Nov-Meksiko enkonduku dulingvan instrusistemon por lernantoj meksik-devenaj. La juĝisto, Edwin L. Mechem, instrukciis al la lernejoj aŭtoritatoj ellabori specialan studoplanon pli konvenan por la bezonoj de la meksikaj lernantoj, kiuj konsistigas 27% de la lernantaro en Portales. Li samtempe urĝis ilin serĉi kaj enoficigi pli multajn kvalifikitajn hispanlingvajn instruistojn. Laŭ la decido de s-ro Mechem, la lernejoj devas “disvolvi instruprogramojn kun dukultura karaktero en kiel eble plej multaj fakoj”.

Tiu nova juĝo rezultis el proceso iniciatita de Fondaĵo por Jura Defendo de Meksik-Usonanoj kontraŭ la respondeculoj pri edukado de Portales.

La usona parlamento akceptis leĝon pri dulingva edukado en januaro 1968. La leĝo celas doni specialan helpon al tiuj multaj infanoj en Usono, kies kapablo uzi la anglan lingvon estas tre limigita. Dulingva edukado signifas, en tiu kazo, la uzon de du lingvoj, el kiuj unu estas ĉiam la angla, kiel instrulingvoj.

Nenio nova por spertuloj

Recenzas Roger Bernard (Francujo):

Esperantonimoj, de Marinko Ĝivoje, Milano; la aŭtoro (sub la aŭspicioj de la revuo *La Patrolo*), 1973. 112 p. 17cm. Ilustrita.

Jen verko kurioza, kaj jam ĝia titolo estas kurioza! Oni vane serĉus en PIV la signifon de la pseŭdo-sufikso "nimo". Sed dank'al la aŭtoro almeto de la subtitoloj "Antonimoj, Homonimoj, Paronimoj (kaj Vortludoj)" la leganto nun eksuspektos, pri kio temas. Listigo de tiuj diversaj kategorioj de vortoj povas efektive havi sian utilon por mezaj uzantoj de la lingvo, por kiuj tiu libro kredeble estis verkita; al spertuloj ĝi ja nenion novan prezentos.

La intence mallonga listo de la Antonimoj ĉefe tiras la atenton al la jam malnova provo anstataŭigi la malvortojn per neologismoj, el kiuj multaj jam enradikiĝis. La ankaŭ mallonga listo de Homonimoj ne estas tre konvinka, ĉar, krom kiam temas pri kolizio de tute apartaj teknikaj vortoj kun pli oftaj (ekz. bato = 1. frapo; 2. hebrea mezurunuo), temas plej ofte pri plilarĝigo aŭ nuancigo de la origina radiko (ekzemple absolvi = 1. pardoni la pekojn; 2. malkondamni, liberigi de akuzo; la 3. estas nekorekta laŭ PIV). Pli interesa estas la listo de Paronimoj: treege utile estas atentigi pri tiuj vortoj, kiuj skribe multe similas unu al alia, sed sence esence diferencas (bela ekzemplo de aliteracio!). Ion similan, en malpli granda skalo, mi mem provis fari, almetante tiajn paronimojn apud miajn "Falsaj Amikoj" (por francoj). Kvankam tre ampleksa la listo en "Esperantonimoj", mankas kelkaj tre okulfrapaj: ekz. ĉe fondo, fonduso, fonto, fundo, oni povus aldoni: fontano, funto, pundo; ĉe provo, pruvo, aldoni pravi (pruvu pravi, ke vi pravas!); ĉe polvo, polvo, pulvo, pulvero, pudro, aldoni pelvo, pulvero. Sed tiuj mankoj estas facile ripareblaj en dua eldono.

KONDIĈOJ DE RECENZOJ

La revuo *Esperanto* principe recenzigas duope ricevitaĵajn novajn librojn kaj diskojn, escepte de nete politikaj. Pri pli gravaj religiaj eldonaĵoj aperas recenzoj neŭtralaj. Eldonaĵojn unuope ricevitaĵajn ni nur mencias. Recenzoj nepetitaĵaj ne aperas.

La ĉapitro pri Sinonimoj montras – kun la riĉeco en nuancoj de Esperanto – pli multe pri najbaraj sencoj ol pri veraj sinonimoj. Komparu: abdiki, demisii, ekŝiĝi, rezigni. Sed ankaŭ tre utila tia atentigo.

La lasta ĉapitro, pri vortludoj, ne ĉiam trafas la plej amuzajn. Sed en tiu ĉi kazo plej bone estas resendi al la tuta verkaro de Raymond Schwartz kaj al la "Mallonga kontribuo al la ŝercologio" de Waringhien en liaj "Eseoj I".

Restas al mi deziri al la aŭtoro pli da sukceso (meritata) ol havis miaj instrucelaj "Falsaj Amikoj": 283 ekzempleroj venditaj en du jaroj (el 3000 eldonitaj) nepagita memreklamo.

Mendu ĉe UEA: 7,50 (por Nederlando 7,80) gld. plus sendokostoj 10%.

Japana tajloro por angla ŝtofo

Recenzas E. V. Tvarožek (Ĉeĥoslovakujo):

Salome, de Oscar Wilde. Trad. T. Chif. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1973. 52p. Foto-represo. 19cm.

En la antaŭparolo la tradukinto klarigas, ke li volis fari tradukon pli bonan ol estas la unua – tiu de Bulthuis: "Mi tradukis kiel eble plej fidele al la originalo, la angla originalo ..." (Tamen, la originalo estis verkita france, kaj la angla teksto estis nur traduko.)

K. Chif tradukis – plej bedaŭrinde – tro ofte laŭvorte, anstataŭ traduki laŭsence, kaj tio iom tordas la sencon de la frazoj. En lia lingvo troviĝas malregulaĵoj – malkorekta uzo de la artikolo, trouzo de la interpunkciaj signoj, vortordo ŝanĝanta la sencan akcenton de la frazoj, arbitra vort- kaj vortformelekto, kiom-tiom anstataŭ kiel-tiel, malkorekta uzo de prepozicioj, reŝpeguloj de anglaj kaj francaj frazkonstruoj ktp. – kiuj unuope eble ŝajnus negravaj, sed kiuj pro sia abundo konsiderinde influas precipe la stilon, kaj tio ĉe drama verko ja estas gravega.

La rezulto de la provo kaj klopodo de K. Chif ŝajnas admoni, ke laŭeble neniu traduku el lingvo, kiun li ne regas plene, en alian lingvon, kiun li ankaŭ ne regas plene; ĉar volante vesti la klasikan unuaktaĵon pri Johano la Baptisto kaj Salome, la filino de Herodo, per nova, pli bela vesto, K. Chif – malgraŭ siaj plej bonaj intencoj kaj klopodo – faris al ĝi veston, kiu sur iom tro multaj lokoj vidigas, ke la ŝtofo estas angla kaj la tajloro estis japano.

Mendu ĉe UEA: 2,40 (por Nederlando 2,50) gld. plus sendokostoj 10%.

Esence etnologia verko

Recenzas Richard E. Wood (Usono):

La naciaj malplimultoj en V.D.R. Hanojo: Fremd-lingva Eldonejo, 1973. 135p. Mapoj. 19cm.

Zorge presita, enhavoriĉa libreto en modela, foje juvelklara lingvo, ĝi levas gravajn demandojn pri la adaptiĝo de malgrandaj naciecoj al la moderna mondo kaj politika ŝtato. Ĝi konsistas el sep diversaŭtoraj kaj diversdataj ĉapitroj, etnologiaj, lingvistikaj kaj marksisme politikaj, kaj du detalaj etnologiaj mapoj.

Aparte interesa al lingvisto kaj esperantisto estas ĉapitro, p. 47-58, pri lingvoplanado kaj kreado de novaj aŭ raciigitaj skribsistemoj. Ĝojiga estas la foja apero de fonema teorio; nekontentiga la manko de fonetika aŭ eĉ esperantalfabeta transskribo ĉe la diverslingvaj ekzemploj. Ege neklara estas la aserto "fonemo z (iom simila al la angla y)" (p. 51) — nu, angla ortografia y reprezentas vokalon aŭ duonvokalon kun tiom da uzoj, ke ĝi estas tute sensenca ekster kunteksto — sed neniel similas al konsonanta z. Ĉu preseraro? (Estus la sola). Simile neklara, ĉar miksitaj, estas la transskribo de nomoj de naciecoj. Ŝajne esperantigita estas *Ja Rai*, ĉar aperas *ĵ*; male, aperas neklarigitaj literoj en *Xa*, *Cham*, *Khao*, ktp.; rezulte, oni ne certas pri la sono de *Ca*, *Cau*, *Bac*. Eksmoda estas la uzo de la termino "lingvo" por tutaj vastaj lingvofamilioj, nur parte kaj teorie rekonstrueblaj, kiel la ĉin-taja, malajpolinezia (p. 6). Sekve, oni devus nomi eĉ la ĉinan — en si mem granda lingvaro — nur "dialekto". Eksmode kaj eĉ kontraŭscience estas, paroli pri "rudimentaj, eĉ primitivaj lingvoj" (p. 10). Tute senrilata al la socia

Laste aperis . . .

Deka tutlanda kongreso de la komunista partio de Ĉinio, La (dokumentoj) (1973) 88p. Ilus. 18cm. Broŝ. 0,90 gld. Raportoj kaj komunikoj de la kongreso, kaj la statuto de Komunista Partio de Ĉinio.

Elektitaj verkoj de Maŭ Zedong, vol. II (1973) 456p. 23cm. Bind. 9,— gld. Verkoj el la jaroj 1937 ĝis 1941.

Esperanto, la lingua internazionale (1973) 4p. 30cm. 0,12 gld. Informilo.

Florkalendaro 1974 12p. 29 x 30cm. 2,40 gld. Belaj kolorfotoj pri floroj en la naturo. Teksto germana-Esperanta, kaj slogano "Esperanto lingvo internacia".

Kokeriko en Noktomezo (1973) 68p. Ilus. 13 x 19 Broŝ. 0,60 gld. Ĉina bildrakonto, kun sepiaj fotoj el pupdrama filmo, kaj konciza suba teksto.

Litova kanto en Esperanto (1973) Ensemblo "Estradinès melodijos", Ork. pri leĝera muziko de Litova Televido kaj Radio. 30cm. 33 t/m. Stereofona. 12,— gld.

Manlibro pri transporto de fluidaĵoj (1973) J. Manceau. 251p. Ksero. Ilus. 22cm. Ringe broŝ. 18,70 gld.

malestimo kaj aĉaj vivkondiĉoj de subpremita popolo estas ĝia buŝa kulturo kaj la strukturo, foje ege kompleksa, de ĝia lingvo. Bonveniginda kaj grava aldono al la etnologia literaturo.

Mendu ĉe UEA: 1,80 (por Nederlando 1,87) gld. plus sendokostoj 10%.

Poezio de krudo

Recenzas J. Kozlevčar (Jugoslavio):

Skota legendaro, de Philippa Galloway. Trad. Guy B. Tordoff. Gloucester (Britujo): Fellowship Press, 1970. 127p. Ilus. 20cm.

En la verko estas kolektitaj 15 legendoj el diversaj regionoj kaj lokoj pri farmbieno, pri rokoj kaj krutaĵoj de la montaro kaj insuloj, pri grizaj kasteloj de la kruda skota lando. La ĉefan rolon ludas kuraĝaj gejunuloj, simplaj kamparanoj, multaj bestoj, gnomoj kaj feinoj.

La tradukinto Guy B. Tordoff bonege travestis ilin en la Internacian Lingvon tiel, ke ili estas nun alireblaj al la vasta mondo. La traduklingvo estas flua, belsona, la stilo ofte poezia. Precipe belstilaj estas la lastaj tri legendoj "La Gnomoj de Cairnsmore", "La Marvirino de Lalloway" kaj "Tomaso la Rimfaranto". Riĉa estas la vorttrezoro el la botanika sfero kaj pri bestoj, precipe birdoj. Unuopajn legendojn ornamas 48 artaj skizoj kaj vinjetoj. Ekzistas en la teksto kelkaj malglataĵoj. "Skotan legendaron" dediĉas la tradukinto en la Enkondukaj Vortoj al la infanoj de la mondo. Vere, la verko povas servi al la lernantoj de elementaj lernejoj kiel kompletiga legaĵo.

Mendu ĉe UEA: 10,44 (por Nederlando 10,86) gld. plus sendokostoj 10%.

Melo antaŭ tribunalo P. Kočić (1877-?). El la serba tradukis N. Korasić (1973). 32p. 17cm. Broŝ. 4,20 gld. Dramo pri Bosnio sub aŭstra regado en la pasinta jarcento.

Renaskita Manfred K.R. El la germana tradukis V.V. de Majnov (1891, fotorepreso 1973). 18p. 22cm. Broŝ. 30,— gld. Triakta dramo kiu daŭrigas *Manfred* de Byron.

Ridu per Esperanto (1973) T. Sekelj. 55p. 17cm. Broŝ. 5,40 gld. Humuraj anekdotoj kaj karikaturaj primovadaĵoj.

Salutkartoj por la nova jaro kun kolorbildoj pri birdoj kaj kvinlingva (Esperanta, angla, franca, germana, nederlanda) teksto. 30 diversaj bildoj. Kun koverto. 1 ekz. 0,90 gld., 10 ekz. 7,30 gld.

Senĉenaj Dialogoj (1973) V. Dall'Acqua. 32p. 25cm. Broŝ. 3,60 gld. Humura teatraĵo pri la Esperanto-movado, preĉipe en Italujo. Enestas multaj aludoj al itallingvaj vortoj kaj diĝaĵoj.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

Enciklopedio

Sub tiu ĉi rubriko aperas tekstoj verkitaj por la nova eldono de "Enciklopedio de Esperanto"

La aliteracio

LA ALITERACIO, nomata ankaŭ literismo, estas ripetigo de sonoj komence de pluraj akcentaj silaboj; la sonoj povas esti konsonantoj (*vokas voĉ' de Väinämöinen, vibras vok' en vaga vento*), vokaloj samaj (*armu vin per arda amo*) aŭ vokaloj malsamaj (*entuziasmas idoj arde*). La asonanco povas esti okaza versornamo; tia ĝi estas ekz. en la Homeraj epopeoj aŭ en *Eneado* de Vergilo, aŭ en la romantika kaj parnasisma kaj posta poezio, ekz. ĉe Poe, Swinburne, Valéry: *la jarloj en Upsalo sorbante bonan bieron* (Leconte de Lisle). En pluraj praliteraturoj ĝi estas esenca apartenaĵo de la verso, efikante ritmofortige: ekz. en la pralatina saturna verso, en la malnovaj finno-ugra, ĝermana kaj ural-altaja poezioj. Plej famaj el ĉiuj tiuj estas la finna *Kalevala* kaj la estona *Kalevipoeg*. Jen parto el la traduko de *Kalevala*: *cerbo mia certe celas kanti nun, komenci ruli tiujn riĉajn rasajn runojn* (Leppäkoski). En la praislanda poezio la asonanco havas severajn regulojn: en la "longa verso" konsistanta el kvar akcentoj en la duono devas esti unu aŭ du rimlitteroj, en la dua duono devas al tiu(j) respondi nur unu, ĉiam en

la unua akcenta silabo: *Lukti lerta lupmalamiko altan arton al mi donis; – al homa hordo ne havas mi ŝaton malgraŭ ke multaj montras pacemon*.

En Esperanto ŝajne validiĝas regulo, ke ĉe tiaj "praliteracioj" ne la unua vort-konsonanto, sed la antaŭakcenta konsonanto efikas pli aliteracie, do *granda ĉagreno* pli bone impresas ol *granda granito*.

Ĉar tia aliteracio plifortigas la akcentan ritm-efikon, oni povas ĝin nomi ankaŭ ritma aliteracio, por distingi ĝin de tiuj konsonant-ripetigoj, kiuj estas destinitaj imiti naturajn bruojn, elmovi imagon de movo aŭ ian senton; ĉi tiujn ni nomu sonpentraj aliteracioj. Ekz. la dentaloj esprimas obstinon, persiston, la guturaloj, precipe mikse kun *r*, krudan bruon (*sub hak' de atak' skuigas kun krak' ... vitro splita*), la likvidoj mildecon, teneron (*ah, legi longe el okula belo kvietan ravon ...*). Ĉe la sonpentro, kiel la ekzemploj montras, la rimlitteroj ne devas nepre stari komence de akcenta silabo. Sed ankaŭ ritmaj aliteracioj povas havi tian sonpentran efekton: *Parfumo freŝa flugis el tufoj asfodelaj, la flustroj de la nokto ekflirtis sur Galgalo*.

Bibliografio:

K. KALOCSAY, G. WARINGHIEN: *Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa Gvidlibro*. Budapest 1932. (2 1968).

B. RAGNARSSON: Iom pri la aliteracio. *Norda Prismo* 1958: 1.44-45.

B. RAGNARSSON: La Hildebrand-poemo kun aparta konsidero pri la ĝermana aliteracio. *la nica lit. revuo* 5.1959/60: 27, 90-94. 28, 141-46.

Kálmán KALOCSAY

Leterkesto

Delegi la estontecon

Skribas Wim De Smet (Belgujo):

La raporto pri la inaŭgura ceremonio de la 58a U.K. (via revuo, septembra numero, p. 144) enhavis frazon, kiu multe ĝojigis min. Estas la unua fojo, ke mi legas la opinion, ke prefere la landaj reprezentantoj, kiuj salutas la Kongreson, devus esti kiel tiuj de Belgujo, Nov-Zelando kaj Usono, nome junaj kaj elokventaj. Estu certaj, ke multaj el la ĉeestantoj de tiu inaŭgura ceremonio volonte subskribos tiun opinion. Juna alparolanto kreas pli esperigan ideon pri la estonteco de la Esperanto-movado, ol tion faras meritplena pioniro kun altaj titoloj. Kaj, se krome la alparolanto estas ĉarma virino, kiel tiuj de Kanado kaj Israelo, la efiko estas certe pli sentebila en la tuta salono. Mi esperas, ke la Landaj Asocioj iom post iom komprenos tiun nesubtaksindan punkton kaj delegos la estontecon de la movado, ne plu la estintecon.

Skribas Christoph Knabe, FR Germanujo:

Estas ia nelogikeco en via agado. Unuflanke vi varbas, ke oni skribante al UEA enmetu kelkajn uzitajn poŝtmarkojn kaj afranku filatele, kio multe helpus al UEA finance. Aliflanke vi mem tiel senfantazie afrankas la revuon *Esperanto*. Ĉu vi ne povus ĝin afranki filatele, por ke ĉiu, kiu skribas al vi, jam disponu kelkajn belajn uzitajn poŝtmarkojn?

Respondas la redakcio:

Niajn leterojn k.s. ni laŭeble afrankas filatele-alloge (kvankam la nederlandaj poŝtmarkoj ne ĉiam estas entuziasmigaj), sed por la amasa ekspedo de la revuo kaj jarlibro la PTT preferas, ke ni uzu la normalajn, nebelajn sed pli facile kontroleblajn poŝtmarkojn.

KOREKTO

En la decembra numero de *Esperanto*, p. 204, aperis artikoleto sub la titolo "Vigla aktivado de ĉeĥaj esperantistoj". Efektive temis pri aktivado ne de ĉeĥaj, sed de slovakaj esperantistoj. Ni pardonpetas pro la nevola misinformo.



59-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 — 08 03

Alta Protektanto: D-ro Klaus von Dohnanyi, Ministro pri Klerigo kaj Scienco de FR Germanujo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam -3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80.

Aktuala ĉeftemo elektita

La ĉeftemo de la 59-a UK estos: "Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo". Ĝi estos traktita unuavice en la Dua Ĝenerala Kunveno de UEA, kaj enkonduka raporto aperos en la Kongresa Libro. Ankaŭ du el la temoj de la Oratora Konkurso kaj iuj prelegoj de la Internacia Somera Universitato estos ligitaj al ĝi. Abundaj ekzemploj en la nuntempa vivo aktualigas diskuton pri la konfliktoj de naciaj interesoj kaj ilia solvo en la kadro de internaciaj organizaĵoj.

Debato pri la gazetaro

La debato fariĝis de post sia enkonduko en la kongresan programon (antaŭ kelkaj jaroj) tre ŝatata ero, dum kiu ĉiu kongresano havas la eblecon defendi sian vidpunkton pri grava movada trajto. La debato en Hamburgo temos pri: "Landaj revuoj en Esperanto — ĉu utilaj?". Unuflanke la bezono de enlanda organiza informilo kaj nacilingva informmaterialo, aliflanke la kontraŭdiro inter la ideo de landa revuo kaj la internacieco de la Esperanta gazetaro — tio formas la kernon de la demando, kiu multe okupas la aktivulojn de la nuntempaj landaj Esperanto-organizaĵoj. Ĉu la ĉi-jara Debato montros la vojon al solvo?

Atenton, oratoroj!

Jam fiksita estas kvar temoj por la Oratora Konkurso en la 59a UK. Rajtas partopreni ĉiuj kongresanoj ĝis inkluzive 28-jaraj, kaj la tri plej bonajn atendas premiojn de 100, 70 kaj 40 guldenoj. La temoj estas:

1. Naciismo kaj internaciismo en mia lando;
2. Ĉu internaciaj sportaj konkursoj kontribuas al internacia amikeco aŭ incitas naciismon?
3. Kion volas la junularo en la Esperanto-movado?
4. Perforto en literaturo kaj sur ekranoj.

La nomo de la unua-premiito estos krome gravurita sur la Pokalo Ivo Lapenna.

La Barbiro el Sofio

En Hamburgo la kongresanoj povos ĝui teatran vesperon, en kiu bulgara trupo el Sofio prezentos francan

komedion. Bulgara Esperanto-Teatro, konsistanta el renomaj kaj premiitaj bulgaraj aktoroj kaj internacie jam konata pro la prezentoj interalie en Vieno kaj Londono, surscenigos en Hamburgo la komedion de Beaumarchais "La Barbiro de Sevilla" (1775), el kiu Rossini faris la samtitolan operon.

Specialaj kondiĉoj por kongresanoj kun pag-problemoj

La Estraro de UEA decidis starigi speciale favorajn kondiĉojn por aliĝoj al la Universala Kongreso en Hamburgo fare de personoj, kiuj pro unu aŭ alia kaŭzo ne povas ĝustatempe transpagi la kotizon. En kelkaj landoj la ŝtato ne permesas transpagi anticipe la kongreskotizon aŭ ne donas pasporton ĝis tuj antaŭ la Kongreso. Tio signifas, ke ĝis nun la personoj en tiuj landoj ne povis ĝui la pli malaltan aliĝtarifon de la unua kaj dua periodoj. Laŭ la decido de la Estraro, tiuj personoj povas nun provizore aliĝi kaj tamen pagi la kotizon en la komenco de la kongresa semajno laŭ la tarifo de la unua periodo. Por ĝui tiujn specialajn kondiĉojn la aliĝanto devas plenumi jenajn kondiĉojn: 1) Li devas plenigi aliĝilon kaj sendi ĝin tiel, ke ĝi atingu la konstantan adreson de la Kongreso aŭ unu el la oficialaj kongresaj perantoj *plej malfrue la 1-an de aprilo 1974*; 2) Li devas doni validan kialon, pro kiu li ne povas — pro valutaj aŭ pasportaj reguloj — jam transpagi la kotizon; 3) Li devas deklari, ke li certe pagos la kotizon tuj post la alveno en Hamburgo.

Vigilaj preparkunsidoj en Rotterdam kaj Hamburgo

La Universala Kongreso, precipe la planoj por la ĉefaj oficialaj aranĝoj, estis diskuttemo de kunsido de estraranoj de UEA en la Centra Oficejo en Rotterdam, la 8-an de decembro. Partoprenis la prezidanto de UEA, prof. Lapenna, la prezidanto de LKK, d-ro W. Bormann, la estrarano de UEA pri financo, s-ro Woessink, la direktoro de la C.O., d-ro Sadler, kaj la nova vic-direktoro, s-ro Milojević, kiuj du lastaj estas nun komune ŝarĝitaj pri la kongresaj laboroj en Rotterdam. Pliaj detalaj diskutoj okazis en Hamburgo de la 4-a ĝis la 6-a de januaro, dum vizito de d-ro Sadler. Sep-hora LKK-kunsido sukcesis tuŝi ĉiujn aktualajn demandojn en la organizado.

Aliĝado kontentiga

Ĝis la 10-a de januaro 1974 aliĝis al la Hamburga UK jam 911 personoj. Komparo de tiu nombro kun samdataj nombroj en aliaj jaroj montras, ke la 59-a UK havas ŝancon esti la plej granda Universala Kongreso de Esperanto okazinta en la lastaj 10 jaroj en okcidenta Eŭropo.

LA 30A INTERNACIA JUNULARA KONFERENCO

Prestiĝa nomŝanĝo

LAŬ DECIDO de la 29a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiu kun aparta sukceso okazis pasint-somere en Sarajevo (Jugoslavio), la sekvanta aranĝo de TEJO havos iom ŝanĝitan nomon — ne plu kongreso, sed konferenco. Sekve, la 30a Internacia Junulara Konferenco de TEJO okazos tuj post la Universala Kongreso. La Konferenco komenciĝos jam la 3an de aŭgusto 1974, la saman tagon kiam finiĝas la 59a UK, kaj finiĝos la 10an de aŭgusto matene.

Preskaŭ tradicie, la junulara sekcio de UEA okazigas sian kongreson (ekde nun konferencon) en la sama lando en kiu okazas ankaŭ la Universalaj Kongresoj. Ĉi tiun jaron, TEJO elektis por la 30a IJK la urbon Münster, 250 km. sudokcidenten de Hamburgo. Se anonciĝos sufiĉe da interesitoj, la organizantoj de la 30a IJK promesas aranĝi grupan vagonaran vojaĝon de Hamburgo al Münster.

Trankvila universitata urbo

Plaĉa kaj bone produktita “Dua Informilo” pri la 30a IJK atentigas, ke Münster estas “trankvila ĉefurbo”, el kies 200 000 loĝantoj, almenaŭ 30 000 estas studentoj ĉe la fama universitato aŭ ĉe iu el pluraj altlernejoj. Gravaj distriktaj, regionaj kaj landaj instancoj elektis Münster por sia sidejo. Tamen, la urbo apenaŭ havas industrion kaj estas ankaŭ tial alloga. Spite al longa historio kaj detruoj, Münster ankoraŭ konservas memoraĵojn pri la tie proklamita “Vestfalia paco” per kiu finiĝis la Tridekjara milito. La urbo-doma “pacsalono” nun estas ĉefe uzata por akceptoj de la urbaj gastoj. La “Dua Informilo” lerte aludas, ke tia akcepto povus koncerni ankaŭ la partoprenantojn de la 30a IJK de TEJO.

Junularo kaj edukado

Konforme al la lastjaraj spertoj kaj orientiĝo de TEJO, la 30a IJK elektis por sia ĉeftemo la pritrakton de “Junularo kaj edukado”. Oni povas atendi, ke la organizantoj de la Konferenco faros refojajn klopodojn, ke la ĉeftemo dominu la semajnon, kiun oni pasigos en Münster, eĉ se tio damaĝos la turisman flankon de la aranĝo okazanta en tia feriinvita medio.

La elekto de la ĉeftemo estas sendube pli trafa, ĉar ĝuste al ĝi oni dediĉas daŭran atenton en preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo. Preskaŭ ĉie evidentiĝas, ke la junularo ne plu volas roli sole kiel objekto de edukado, sed ĝi pledas (ofte eĉ ribele) por aktiva, subjekta rolo en la eduka procezo. Laŭ la disponeblaj informoj

ŝajnas, ke oni por la 30a IJK prizorgos referatojn de edukaj fakuloj, sed oni samtiel zorgos pri aktiva kontribuo de ĉiuj partoprenantoj de la Konferenco. Kun aparta intereso oni povas atendi diverslandajn raportojn pri progreso jam notita en la eduka kampo kaj pri obstakloj kiuj malebligas sukcesojn. Por ĉion ĉi ligi al realo, la organizantoj planas vizitojn al la edukaj institucioj en Münster kaj ĝia proksimeco.

Oni promesas komforton

La partoprenantoj de la 30a IJK verŝajne loĝos en moderna studenta domo, kiu nun estas konstruata apud “Aasee”, granda artefarita lago en la centra parto de la urbo. Temos pri komfortaj unulitaj ĉambroj, kies nombro tamen estas limigita, kio siaflanke instigu al kiel eble plej baldaŭa aliĝo kaj mendo de loĝejo.

Kotizoj rekomendas rapidi

La kotizoj, kiuj kiel kutime inkluzivas ĉiujn bazajn kostojn de la aranĝo (aliĝo, tranoktoj kaj manĝoj) estas kalkulitaj en germanaj markoj kaj montras grandan varion, depende de la aliĝperiodo. Rilate la kostojn, estas samtiel grave, ĉu temas pri membro aŭ ne-membro de TEJO/UEA. Kompreneble, ke la membroj ĝuas pliajn favoraĵojn. Jen la nun aktualaj kotizoj, tiuj kiuj validas ĝis la fino de marto: gejunuloj sub la aĝo de 20 pagas 85 (ne-membroj 95) markojn, tiuj inter 20 kaj 25 jaroj pagas 95 (ne-membroj 105), kaj la aliĝantoj pli ol 25-jaraj devas pagi 105 (ne-membroj 115) germanajn markojn. En la lasta aliĝperiodo la kotizoj estos, kiel dirite, multe pli altaj, kaj sumos inter 110 kaj 140 markoj.

La aliĝilojn oni sendu al: *30a IJK, p/a Gisela Jungkamp, D-44 Münster, Mondstr. 3, FR Germanujo*. La kotizon oni jam nun povas ĝiri al *poŝtĉekkonto Dortmund n-ro 1196 20-468*, je la nomo de: *Ulrich Brandenburg, Sonderkonto 30a IJK, D-4401 Westbevern*.

Laŭ interkonsento de la TEJO-Estraro, aliĝantoj el netranspagipovaj landoj ĝiru samtempe kun la aliĝo garantian sumon, egalvaloron al 5 usonaj dolaroj, al sia Landa Sekcio de TEJO. Aliĝilojn oni sendu rekte al la adreso de la 30a IJK, sed ili estos traktitaj nur post la informo, ke la garantia sumo estas pagita. Tiu sumo estas ne-repagebla, sed ĝi poste estos subtrahita de la pagenda kotizo. Pri ĉiuj detaloj tiurilate, bonvolu turni vin rekte al la adreso de la 30a IJK.



Bulgarujo

- En la surtabla kalendaro 1974 de la eldonejo de Bulgara Komunista Partio, aperinta en 150 000 ekz., estas presita informo pri la 115a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, la 15an de decembro 1974. Tiu mencio certe rezultigos pli grandan atenton al Esperanto kaj al Zamenhof flanke de redakcioj de ĵurnaloj kaj de lokaj radiostacioj en Bulgarujo.

- Esperanto-societo "Espero" en Polski Trâmbeŝ ĉe la Bazo por Teknika Evoluado aktive uzas Esperanto-kontaktojn por fakaj celoj. Pere de Esperanto la societo ricevas el multaj landoj projekt-materialojn, katalogojn por specialistoj, kiuj permesas al ili esti informitaj pri la plej lastaj teknikaj novaĵoj tra la mondo.

Hinda Unio

- Atingis nin letero de s-ro S.V. Pimpalkhare el Bombajo, kiu skribas: "Antaŭ kelkaj jaroj mi lernis Esperanton..., sed ne povis fari ion por disvastigi ĝin en mia propra lando, malgraŭ via helpo de tempo al tempo. Tamen, la proksiman 15an de decembro mi komencos kurson en Bombajo por instrui la Internacian Lingvon. Mi raportos al vi la progreson de miaj klopodoj poste".

Belgujo

- La urba biblioteko de Kortrijk posedas pli ol 2 200 librojn en Esperanto. Inter la lastatempaj akiraĵoj atenton vekas la manuskripto kaj presprovaĵoj de la Zamenhofa traduko de "La gimnazio", verko de Ŝalom Aleĥem.

Francujo

- La regiona televida stacio "Langvedoko-Rusiljono" dissendis la 15an de decembro 1973, okaze de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof, unu-horan programon kiu inkluzivis intervjuon kun la pioniro René Llech-Walter. La intervjuo okazis sur la strato Zamenhof, situanta en la centra parto de Perpignan. Krome, la elsendo enhavis prezenton de Esperanto-libroj kaj provlecionon de Esperanto, kiun s-ro Llech-Walter faris laŭ propono de la televidistoj.

- Fine de la jaro 1973, la franca televido plurfoje prezentis elsendon pri Kopernik kaj vojaĝanta ekspozicio de infandesegnaĵoj, kolektitaj helpe de la Internacia Lingvo en 29 landoj.

Malto

- UEA delegito en Vittoriosa informas, ke la 2an de decembro 1973 komenciĝis Esperanto-kurso en la loka kolegio, al kiu aliĝis ĉ. 40 studentoj. Pluraj ĵurnaloj kaj la maltaj televido kaj radio raportis pri la afero.

Fake

Literaturo

- Jam dum multaj jaroj ekzistas en Leningrado (Sovetunio), en la Domo de Verkistoj, tre populara buŝa almanako (speco de viva gazeto) "Unuafoje en la rusa lingvo", pri tradukoj en la rusan. La 54a numero de la almanako estis dediĉita al la temo "Esperanto kaj la arta traduko". Tiu senprecedenca temo en la historio de la almanako ekestis dank' al sindona laboro de juna instruistino kaj E-tradukistino D. Lukjanec. Ampleksan enkondukan parolon al la programo faris la delegito de UEA en Leningrado docento S.N. Podkaminer.

Jonas

- "Karaj gesamideanoj! Okaze de la jarkomenco mi sendas al ĉiuj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto plej korajn salutojn kaj bondezirojn. Komune kaj en la sama spirito ni varbu por internacia kunlaboro kaj interkompreniĝo. Tre vasta celo estas la mondpaco." Tio ĉi estas la vortoj, kiujn la Federacia Prezidanto de Aŭstrujo d-ro Franz Jonas persone eldiris en la Internacia Lingvo, antaŭ la mikrofono de la novaj, ĉiusemajnaj Esperanto-elsendoj de Radio Vieno. La saluto estis disaŭdigita dufoje, nome en la elsendoj kiuj

Verkistoj

- Aperis la 1-a volumo de "Leksikon pisaca Jugoslavije" (Enciklopedio de jugoslaviaj verkistoj), konceranta la jugoslaviajn aŭtorojn kun nomoj de A ĝis D. La verko prezentas ankaŭ jugoslaviajn Esperanto-verkistojn (D. Bedeković, S. Adžić, N. Bubalo, R. Ĉupić, D. Brozović, T. Ĉufar k.a.), samkiel bibliografion de Esperanto-tradukoj de la verkoj de jugoslaviaj verkistoj, menciante la nomojn de ĉiuj tradukintoj. La plej longan liston de tradukintoj (14) enhavas la artikolo pri la slovena verkisto Ivan Cankar. En la 16-membra redakta komitato de tiu eldonaĵo troviĝas ankaŭ eminenta jugoslavia verkisto Živan Milisavac, kiu delonge estas ankaŭ esperantisto. En la longa listo de ĉ. 180 kunlaborantoj oni renkontas ankaŭ la nomojn de tri aliaj esperantistoj: d-ro Pero Ŝoć, antaŭ kelkaj jaroj forpasinta verkisto, d-ro Kalman Kovać, ĉefredaktoro de granda enciklopedia serbokroata-hungara vortaro kaj Marinko Gjivoje, Esperanta bibliografo kaj leksikografo.

Turismo

- Delegitaro de 200 personoj, inter kiuj pluraj deputitoj, ĵurnalistoj kaj eminentuloj de la itala urbo Verona vizitis fine de la jaro Leningradon. En la delegitaro troviĝis ankaŭ kelkaj esperantistoj, je kies disono por vizitoj kaj informoj ĉiam staris sovetaj esperantistoj. La ceteraj membroj de la delegitaro, kiuj spertis gravajn lingvajn malfacilaĵojn, kun admiro notis la utilecon de la Internacia Lingvo.

Persone

okazis la 29an kaj 30an de decembro 1973.

Sárosi

- Antaŭ nelonge, la hungara aktoro Mihály Sárosi fariĝis 80-jara. Fininte siajn studojn en 1915 li jam en 1916 fariĝis militkaptito en Ruslando, kie li, en Siberio, konatiĝis kun Julio Baghy. Ili tie fondis aktorgrupon. Sárosi lernis Esperanton kaj fariĝis populara Esperanta kantisto. Reveninte en la patrolandon, li regule kontribuis al artaj Esperanto-aranĝoj kaj komponis muzikon por multaj poeziaĵoj de Baghy kaj Kalocsay.

N-ro 474, 1973 - 12 - 20

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

AŬSTRUJO: S-ino Grete Breunlich. BEL: Alex Geysels. FIN: S-ino Heta Kesälä, Joel Vilkki. FRANC: Claude Martins, M. Valluet. FRG: S-ino R. Beug, Werner Heimlich jun., Werner Heimlich senior, Werner Heinrich, Christoph Knabe. ITAL: Ing. G. Spertini. KAN: Rüdiger Eichholz, S-ino Vilma Eichholz. NED: P.M.E. Bingen, F-ino M. T. Frus, S-ino M. Hoonakker-Eikenhout, S-ino T. v. d. Meulen-Bulthuis. SVIS: S-ino Lucienne Dovat, Carlo Nicolodi. USON: S-ino B. Garrett, S-ino Madge Silia.

MEMBRO-SUBTENANTO 1973

KAN: Dwight L. Keister.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1974

AŬSTRAL: L. Scott. BRIT: F-ino P.C.Sinclair. DAN: Arne Blume, S-ino E.Geertsen, E.Hansen, J.Pedersen, Ib Schleicher. FRANC: H.Dabiez, G. Larglantier. FRG: Louis Beaucaire, Hermann Behrmann, H. Bily, D-ro E.Fritsch, S-ino Frieda Michalik, Wilhelm Th. Oeste, F. Teltz. KAN: S-ino A.L.Maier-Bevel. NED: H. C. Luyke, A. W. Treurniet. NOR: Ole Børresen, G. Ringstad. NOVZ: D. J. Langman. SVED: P. Almén, B. Andersson, Stig H. Carlsson, S-ino R. Emson, B. Fingalsson, Yngve Forslund, H. Håkansson, Leif Holmlund, E. Johansson, D. Kullberg, E. Lindberg, S-ino Dagny Lundgren, W. Malmsten, S. Möllestad, G. Nordström, R. Nordström, F-ino Brita Nylén, S-ino G. Nylin, Olle Olsson, Folke Pettersson, Henry Rydberg, S-ino Rut Svärd. USONO: G. W. Chamberlin, Carlos I. De Jesus, D. M. Keedy, René Oehler.

AVERTO

En la lasta tempo diversaj personoj sendis al la Libroservo de UEA nepetitajn librojn kaj diskojn, plej ofte sen indiko de la celo, sed evidente kun la motivo, ke UEA aĉetu tiujn eldonaĵojn. Bedaŭrinde tio kaŭzas nur ĝenon al la laboro, ĉar la senditaĵoj estas ofte ne bezonataj. Tial ni insiste petas, ke oni *nenion sendu al ni sen antaŭa konsento*, tiel ke la libroservo povu akurate kaj orde funkcii.

Libroservo de UEA.

DONACIOJ 1973 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Kanado: S-ino D. Henderson 1382,63. Nederlando: F-ino W. Steffering (heredaĵo) 1166,02. Sumo ĝisnuna: 3599,68.

FONDAĴO CANUTO: Okcidenta Berlino: G. Schmidt 624,28. Sumo ĝisnuna: 3286,83.

ĜENERALA KASO: Anonime: 1,—. FR Germanujo: W. Gieseler 100,—. Svedujo: G. Anderson 37,22. Sumo ĝisnuna: 1378,83.

NOVA DUMVIVA PATRONO A DE TEJO: Nederlando: R. Moerbeek.

PATRONAJ MEMBROJ A DE TEJO 1973: Pro eraro en la C.O., s-ro G. Pirlot estis menciita dufoje. Ni pardonpetas. La ĝusta nombro sekve estas: 23.

PATRONAJ MEMBROJ A DE TEJO 1974: 3. G. Pirlot, Belgujo. 4. F-ino E.L. Parson: 5. D.J. Langman, Britujo. 6. G. Becker, FR Germanujo.

PROPAGANDA KONTO: Finnlando: S. Kauppinen 7,18. Nederlando: A.M.E. van Walsem-Schutte 50,—. Anonime: 996,70. Sumo ĝisnuna: 3444,12.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. UEA.

Unuguldenaj ŝparlibroj

Fidela membro, loĝanta en Nederlando, faris tute novan proponon al UEA.

Li skribis al mi jene:

Mi estas 62-jara kaj volas postlasi al UEA parton de miaj financoj. Pro iuj kaŭzoj mi ne emas jam fari testamenton sed tamen deziras fari aranĝon tiel, ke, se mi subite mortos, malgraŭ la foresto de testamento tamen venu mono al UEA. Mi proponas, ke UEA prenu je sia nomo ŝparlibron en A-banko, metu en tiun konton 1 guldenon kaj donu la ŝparlibron kaj dumvivan rajtigilon al mi. Mi intencas meti monon en tiun ŝparlibron laŭ mia plaĉo kaj ankaŭ reprenos sumojn, kiam tio necesos al mi. Okaze de mia morto la rajtigilo forfalos kaj, ĉar la ŝparlibro estas je la nomo de UEA, UEA povos disponi pri la saldo postmorta. En la komenco de ĉiu jaro mi sendos vivsignon al la Centra Oficejo de UEA. Kiam tiu vivsigno forrestos, UEA informiĝu pri mi.

Estas kompreneble, ke post tiu letero mi komencis korespondi kun la koncerna sinjoro. UEA volonte kaj kun danko akceptis la faritan proponon. UEA dume malfermis la petitan ŝparkonton, kaj nia membro havas la ŝparlibron kaj povas meti kaj forpreni monon laŭ sia bontrovo.

Alia propono de nia membro estas, ke ĉi tiu aranĝo estu publikigita. Li

opinias, ke verŝajne ekzistas pluraj membroj de UEA, kiuj troviĝas en similaj cirkonstancoj kaj kiuj same ankoraŭ ne emas fari testamenton, sed pretas laŭ sama vojo garantii al UEA postlason de bonhavo en okazo de forpaso.

Parenteze estas aldoninde, ke en la koncerna nederlanda banko la afero estis rapide kaj facile aranĝita.

Se iuj el la legantoj deziras sammaniere fari la necesajn paŝojn por postmorte heredigi iun sumon al UEA sen sinturno al notario, ili priparolu la ideon kun la estro de sia banko aŭ ŝparkaso. Por la malfermo de nova ŝparkonto je la nomo de UEA (kun la deponinto kiel unusola daŭra rajtigito dum lia vivo, ankaŭ por forpreno de deponita mono) estos necese, ke estraranoj de UEA subskribu la formularon de la banko aŭ ŝparkaso. Tutcerte tiu estro donos la necesajn informojn.

Se oni havas tiujn informojn kaj formularon, oni bonvolu skribi al mi, kiel estrarano pri financoj de UEA.

Se iu tamen preferas, ke mi turnu min por li al la banko, mi tion volonte faros. En tiu kazo necesas indiki en sia letero la adreson de la banko kaj la lingvo(j)n, en kiu(j) eblas korespondi kun ĝi.

E.J. Woessink
estrarano pri financoj



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1973, Dua Parto, p.157. Mallongi-
goj: I = informoj; P = parolado; K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90m (6135 kcs), 41.27m (7270 kcs). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Warszawa, 41.99m (7145 kcs), 31.45m (9540 kcs), 31.01m (9675 kcs).

Dimanĉe

08.30-08.55 Sofia, 49.42m (6070 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
10.30-11.00 Muritiba, 190m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 47.69m (6290 kcs), 40.18m (7470 kcs), 35.62 m (8425 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
12.30-13.00 Pekino, 54.10 m (5545 kcs), 36.41 m (8240 kcs), 25.04 m (11980 kcs), 19.89m (15080 kcs), 16.97m (17680 kcs). I.
20.00-20.20 Roma, 41.24m (7275 kcs), 30.90m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperanto-fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italujo.
20.05-20.30 Sofia, 50.61 m (5928 kcs). P.
22.45-23.00 Valencia, 358m (836 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kcs) kaj Guarulhos, 205m (1460 kcs), 90.23m (3325 kcs). I.K. Sintezo de Esperanto, Caixa Postal 370, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.

12.00-12.15 Gdańsk, 66.29 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la antaŭa vendreda programo el Warszawa. (ĉiun alternan lundon).
12.20-12.30 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94m (21520 kcs), 13.90m (21585). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.

Marde

16.45-17.00 Bratislava, 68.84 Mcs (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 Mcs, 69.20 Mcs, 69.50 Mcs, 69.68 Mcs. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo.

Merkrede

12.20-12.30 Bern, kiel lunde (s-ro Gacond).
13.00-13.15 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A-1041 Wien, Aŭstrujo. (Ĉiun kvaran sinsekvan merkredon).
20.45-21.00 Sabadell, 203 m (1475 kcs), 89.1 Mcs (mod. frekv.). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

Ĵaude

16.35-16.50 Bratislava, kiel marde.
21.45-21.55 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.86 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.28 m (9590 kcs), 31.14 m (9635 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.27 m (11870 kcs). P. (d-ro Baur).
23.05-23.00 Zagreb, 264 m (1163 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavio.

Vendrede

18.00-18.30 Clermont-Ferrand, 90.4 Mcs (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63000 Clermont-Ferrand, Francujo
20.00-20.30 Pekino, 47.84 m (6270 kcs), 47.61 m (6300 kcs), 45.38 m (6610 kcs), 35.34 m (8490 kcs), 31.98 m (9380 kcs). I.
23.10-23.25 Warszawa, 1321 m (227 kcs), P.

Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando. (ĉiun alternan vendredon).

Sabate

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.45-21.55 Bern, kiel ĵaude (s-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por esperantistoj"; 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 21.00 h ĝis 21.30 h per ondoj 49 m, 41 m; 2) dum la svedlingva programo marde de 15.00 h ĝis 15.30 h per ondoj 49 m; 3) dum la danlingva programo dimanĉe de 20.00 h ĝis 20.30 h per ondoj 49 m, 41 m. La anguletoj estas kelkminutaj kaj pritraktas nur Esperanto-temojn.

USONO. Radio-kurso estas dissendata de diversaj lokaj stacioj (vidu la rubrikon de la pasinta monato).

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislava (ankaŭ en eksterlandlimaj regionoj), Clermont-Ferrand, Gdańsk (M.F.), Muritiba, Sabadell;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Valencia (en suda Eŭropo), Warszawa, Wien (aŭdebla en centra Eŭropo), Zagreb;

c) stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba-Guarulhos (en Brazilo kaj najbaraj landoj);

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (31.28 m, 31.14 m, 25.60 m, 25.27 m, 19.44 m, 16.86 m, 13.94 m, 13.90 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebila laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj cirkonstancoj diversspecaj.



Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas sole nur la anoncantoj.

ANONCO DE HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO

HEA oficiale anoncas, ke Imre Székely (Szeged, Hungarujo) ne estas membro de Hungara Esperanto-Asocio. Li ne rajtas organizi Esperantenkontiĝon en Hungarujo. HEA ne respondecas pri lia agado.

Fondumo Esperanto, Esperantotie 4, SF-02220 Iirislahti, Finnlando, vendas librojn Trompeter 151 paĝoj. Verkoj de Heine en Esperanto 317 paĝoj.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK-5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

Opola E-klubo organizos letervesperon, januaro '74. Skribu amase. Respondu al ĉiuj. PL 45-777 Opole, ul. Zwycęstwa 2-4 m 91, Pollando.

Se vi havas vendeblajn ekz. de Esp. revuoj kaj libroj, bv. skribi al s-ro Ramon Molera — str. Sta. Joaquina, 13 — Moyá (Barcelona) — Hispanujo.

La tornistro (por instruoj kaj por distro) No. 1. Literatura jarkajero ilustrita. Varia enhavo: artikoloj, poemoj, spritaĵoj, recenzoj, rakontoj, ktp. 52 p. 22 cm. Prezo: 5 gld. Mendu ĉe UEA; aŭ kontraŭ 5 gld., egalvaloro aŭ 10 internaciaj respondkuponoj, ĉe Argentina Esperanto-Instituto, C.C. 58, Suc. 12, Buenos Aires, Argentino.

Ni serĉas esperantistojn, kiuj ankaŭ suferas je la haŭt-malsano psorazio. The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, Britujo. Represo petata.

Prof. inĝ. Momčilo Šaponjić, UEA-delegito en Beograd, informas pri adresŝanĝo. La nova adreso estas: Svetog Save 25—29, I sprat, stan 4, YU - 11000 Beograd, Jugoslavio. Provizora telefonnumero: 44 49 88.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 København, daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.



H.H.A. v. Rijswijk, fraŭlo, Vreeswijkstraat 793, Hago, Nederlando, oficisto, deziras korespondi tutmonde. Respondu certa.

Korespondado per poŝtkartoj. Antônio F. Figueredo Filho, Rua São Joaquim 321, São Paulo (0 1508), Brazilo.

Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? elĉerpitan beletraĵon? praverkon el la 19a jarcento? mankantan jarkolekton de malnova revuo? Demandu ĉe la Fotokopia Servo de UEA, kiu povas havigi al vi unuarangajn kserografiazajn kopiojn el la Biblioteko Hodler. Prezo de unu kopio (= du paĝoj de mezformata libro): 0,30 gld. Sendokostoj 10%. Petante oferton, indiku klare la titolon kaj, laŭeble, la eldonjaron.

Pro speciala intereso mi rapide deziras kontakton kun botanikisto en Kolombio. Resp. al H. Jones, Box 2324, S - 290 20 Åhus, Svedujo.

Eksterlandanoj sendu bildkartojn al Februara Ekspozicio, City Central Library, Hanley, Stoke-on-Trent, Britujo.

Donacu al viaj geamikoj la novan kaj allogan legolibron AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO, kiu enhavas 2000 konversaciajn frazojn, parolturnojn, didaktikajn demandojn kaj respondojn, kaj 20 tutpaĝajn ilustraĵojn. Prezo: 4,50 guldenoj (por Nederlando: 4,68 gld.); sendokostoj: 10%. Mendu ĉe via-landa libroservo aŭ rekte ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002. Poŝta ĉek-konto: 37 89 64.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donaco(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

Filatelistoj! UEA povas liveri al vi kolekton de poŝtmarkoj de preskaŭ ĉiu ajn lando aŭ temo je du trionoj de la efektiva kataloga prezo. Minimuma mendosumo: 10 guldenoj. Sendu vian mendon, prefere kun samtempa pago, al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkuponon kompletan liston de siaj programoj.

Korespondemuloj! Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian foton. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por senpaga aperigo apud la koncernaj paĝitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

CURSO DE ESPERANTO

Plena Gramatiko kaj ekzercoj.

Prezo: 3,06 gld. (ĉ. US\$ 1,—) + sendokostoj 10%.

CLAVE DE ESPERANTO (1973)

Kun vortaroj Esperanta-Hispana kaj Hispana-Esperanta.

Prezo: 3,06 gld. (ĉ. US\$ 1,—) + sendokostoj 10%.

Sendu poŝt-mandaton (ne bank-ĉekon) al
Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnen-
weg 176, Rotterdam-3002, (Nederlando)
aŭ rekte al: Alberto Gomez Cruz, Apartado 1-664,
Guadalajara, Jal. (Meksiko).

Helsingör 1974

tuj antaŭ UK de Hamburgo

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21. —
27. de julio en La internacia Altlernejo de Helsingör.
Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn
tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ
la Kongreso de Hamburgo. Karavanvojaĝo el
Helsingör al Hamburgo, kaj reen, estos aranĝita per
trajno speciala por la kursanoj. Programo senpage
havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

ĈU VI JAM HAVIS KONTAKTOJN KUN

ĈU VI
AŬDIS,
KE ĜI
ESTAS
IO TUTE
ALIA?
CETERE,
ĈU INDAS
SIMPLE
KREDI
AL ALIAJ?



ĈU VERE NE EBLUS PROVI MEM ĈU
ĜI MERITAS LA FAMON ĜUATAN?

Abono: NUR 11 gld. (por Nederl. 11,44).

Ĝi preskaŭ neniam aperas ĝustatempe, sed
ĝia enhavo estas ĈIAM aktuala kaj freŝa!

Eldonas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo,
Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Ĉina Esperanta monata gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Varbas abonantojn de 1974

Abonprezo:

1 jaro 6,— gld.

2 jaroj 9,— gld.

3 jaroj 12,— gld.


(Por Nederlando aldoniĝas
enlanda imposto 4%.)

Abonu ĉe:

Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando;
poŝta ĝirkonto: 37 89 64.

aŭ rekte ĉe Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino Ĉi

Specimeno akirebla senpage



Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj
Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"
faka kunlaboranta asocio de UEA

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subten-
anta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esper-
anto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852),
Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)

Invitas vin
al memorindaj libertempoj
en franca "Loire"-valo

ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo Grésillon — F-49150 — BAUGÉ — Francujo

Programo 1974

Dum PASKAJ FERIOJ, de la 23a de Marto ĝis la 2a de Aprilo

SEMINARIO pri SUPERAJ STUDOJ

Kursoj kaj pedagogio

Samperiode, de la 23a ĝis la 29a de Marto

13a KULTURA SEMAJNO organizita de JEFO

sub la aŭspicioj de UFE

Programo preparita de la gejunuloj,

paroladoj, debatoj, kulturaj kaj distraj vesperoj

DUM LA SOMERO

Unua Periodo: de la 1a ĝis la 21a de Julio

KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ

Tri diversgradaj kursoj, preparado al ekzamenoj

Diversaj Aktivaĵoj, Distraĵoj, Promenadoj

Dua Periodo: de la 22a de Julio ĝis la 11a de Aŭgusto

INTERNACIAJ SEMAJNOJ

Prelegoj, Konversacioj, Ekskursoj, Diversaj Aktivaĵoj

Tria Periodo: de la 12a de Aŭgusto ĝis la 2a de Septembro

STUDSEMAJNOJ

Tri diversnivelaĵoj kursoj, preparado al ekzamenoj

Diversaj Aktivaĵoj kaj Distroj

En ĉiuj periodoj, plej diversaĝaj partoprenantoj kaj famili-
membroj povas trovi en Grésillon kaj ĝiaj 14-ha-aj verdaĵoj,
ripozon kaj amuzdiversecon, ankaŭ ravajn promenadojn en
la ĉirkaŭaĵoj.

Ĉambrojn oni devas rezervi kiel eble plej frue je la ĉi-supra
adreso.

Dek mil libroj disponeblaj!

Dank' al la instalo de moderna kserografia kopiilo en
la Domo de UEA en Rotterdam, la tuta riĉaĵo de la
Biblioteko Hodler, kun multaj miloj da libroj kaj
gazetkolektoj, estas nun atingebla je moderaĵoj prezoj
por ĉiuj membroj ĉie ajn en la mondo. Jen nur
kelkaj ekzemploj de jam pretaj kaj tuj livereblaj foto-
kopioj. La Fotokopia Servo de UEA volonte plenum-
as viajn mendojn pri tiuj aŭ iu ajn alia volumo el sia
kolekto. Petu oferton pri specifa verko aŭ petu
kompletan liston de la jam pretaj kopioj!

<i>Kiel plaĉas al vi</i> (Shakespeare) 137p. Ilustr.	21,70
<i>Statistiko de 50 000 tekstvortoj</i> (Blaas) 1950	12,50
<i>La langue internationale</i> (Zamenhof) 1887	9,20
<i>Bhagavad-Gîtâ</i> (tr. Lorenz) 1942 95p.	16,40
<i>Filozofia vortaro</i> (Kamaryt) 1934. 170p.	14,75
<i>Juristisches Wörterbuch Deutsch-Esp.</i> 86p.	8,60
<i>Oduseias de Homeros</i> (tr. Manders) 306p.	48,20
<i>La ringo de la generalo</i> (Lagerlöf) 127p. 1938	11,60
<i>La venecia komercisto</i> (Shakespeare) 101p.	10,10
<i>Dekdu poetoj</i> (red. Kalocsay) 126p. 1934	11,60
<i>Infero</i> (Dante/Kalocsay) Ilus. ĉ.300p. 1933	49,40
<i>Plena gramatiko vol. 2</i> Eldono 1964. 178p.	29,60
<i>Sinjoro Tadeo</i> (Mickiewicz/Grabowski) 334p.	30,—
<i>Robinsono Kruso</i> (Defoe) 143p. 1908.	12,80

Ĉiu kompleta kopio estas liverata en plaĉa plasta
bindaĵo. Prezoj estas en guldenoj. Aldoniĝas 10%
por sendokostoj kaj, por Nederlando, 4% imposto.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 53 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 18 numeroj jare
- 2 senpagaj dupaĝaj suplementoj pri literaturo kaj scienco
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Jarabono: 335 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1**

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska